

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

40 jarojn
Patrolanda
Fronto

Dimitrov-
muzeo
en Lejpcigo


Skizoj sen
retuŝo


Instru-meto-
dika laboro

Poezia „Sirin-
ga Vespero“
en Loveĉ

Enlanda mo-
vado

La gefiloj de
Zilbernik





POR LA PATRIOTA UNUECO DE LA BULGARA POPOLO

„ . . . Laŭ mia opinio, ju pli malmultenombra estas iu popolo, des pli ĝi devas strebi esti forta kaj potenca per siaj racia spirito kaj kreoverkoj. La grandaj ŝtatoj kaj popoloj povas fieri pri sia granda teritorio, pri sia granda materiala kulturo ktp. Bedaŭrinde, ni havas nek grandan teritorion, nek grandan materialan kulturon, sed ni povus konkuri kun ili kaj eĉ antaŭi ilin el ili, se ni pliligu nian propran moralan forton, nian nacian spiriton — potencon kaj neŝancebleblan, se ni havus firman kredon je nia propra estonteco. Neniu povos malutili al ni, se ni ĉiuj kune gardos nian propran domon kaj konstruos nian propran popolan respublikon. Oni povas enmiksiĝi en niaj aferoj, oni povas malhelpi al ni, sed tamen ni eltenos kaj finfine ni eliros sur la vojon de nia popola prospero, eĉ mi dirus — sur la vojon de nia popola majesteco. . . .”

„ . . . Nia lando kaj nia popolo estas malgrandaj, sed ni posedas grandan volon kaj kuraĝon! Kaj ja estonton kaj feliĉon tiel en la privata, en la persona vivo, kiel same en la publika kaj ŝtata vivo havas ne la timemaj, ne la senvolaj, ne la mallabremuloj. La feliĉo kaj la estonto tiel en la persona, kiel ankaŭ en la publika vivo rajte apartenas al la kuraĝaj, obstinaj kaj fidelaj al sia devo viroj, virinoj kaj gejunuloj. Popolo, kiu ne posedas similajn kvalitojn, vole aŭ kontraŭvole, falos sub fremdan jugon. Nun ni surpaŝis la larĝan vojon, laŭ kiu oni marŝas pri facile, ol laŭ tiu kruta kaj mallarĝa vojo, sur kiu ni devis venki tiom multajn obstaklojn. . . .”

„ . . . Ni bezonas popolan unuecon. Pri tio zorgas kaj por tio ĉiutage laboras nia nevenkebla Patrolanda Fronto sub la gvidado de la glora laborista klaso kaj de ĝia Komunista Partio”

„ . . . Klom pli unuecaj estas ni kiel popolo, kiom pli fortaj ni estas en ekonomia, politika kaj kultura rilatoj kaj kiom pli forta kaj solida estas la defendo de nia ŝtato — per armiloj kaj per neŝancelebla spirito, kiom pli stabilaj estas niaj kontaktoj kun la aliaj pacamaj popoloj, tiom pli malgrandaj estos la arogante de niaj eksteraj malamikoj, iliaj pretendoj pri niaj sanktaj landlimoj, pri la teritoria tuteco de nia Patrolando, malpli efikaj estos iliaj provoj likvidi niajn liberon kaj sendependecon, tiom pli malgranda estiĝos la danĝero pri nova milito. . . .”

„ . . . Ni devas esti fieraj kaj feliĉaj pro la fakto, ke nia popolo povas prezenti imitindajn ekzemplojn, kiuj sendube plialtigos kaj firmigos la estimon de la aliaj popoloj al ni. . . .”

GEORGI DIMITROV





BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

JUNIO

6 • 1982

40 JAROJN SUB LA STANDARDO DE LA PATROLANDA FRONTO

(1942—1982)

La plej amasa soci-politika organizaĵo en Bulgario — la Patrolanda Fronto, okazigis sian IX Kongreson inter la 21-a kaj 23-a de junio k. j. La delegitoj de la pli ol kvarmiliono armeo de membroj de la Patrolanda Fronto renkontiĝis en la unua tago de la somero, kiam kreskas la esperoj de l'semantoj de abunda rikolto, kiam la laborema bulgara popolo fordonas siajn fortojn al la socialisma konstruado kaj al la batalo por paco. La kongreso denove pruvis la altan politikan konscion kaj nedisigeblan unuecon de la bulgara popolo.

Je la 17-a de julio 1942 per la eksterleĝa radiostacio „Hristo Botev“ oni anoncis la Programon de la Patrolanda Fronto. La Programo prezentis demokratian tulpopolan ĉarton, enhavantan la plej gravajn vivnecesajn taskojn por la lando. Ĝi emfazis, ke la kontraŭpopola politiko de la registaro de reĝo Boris III estas danĝera por nia lando. Bulgario fakte estis vasalo de Hitlera Germanio, kaj la bulgara popolo — sklavo de la germanaj bankiroj kaj industriistoj.

„En la nuna historia etapo — akcentis la Programo — plej grava devo de la bulgara popolo, de ĝia armeo kaj patriota intelektularo estas unuiĝi en potencon Patrolandan Fronton por savi Bulgarijon“.

La unua Programo de la Patrolanda Fronto celis unuiĝi por batalo kontraŭ la monarkia reĝimo kaj la germanaj okupantoj ne nur labaristojn, metiistojn, intelektulojn, sed ankaŭ la patriotajn oficirojn kaj la nefaŝistan parton de la burĝa klaso.

La ideo pri Patrolanda Fronto trovis bonan grundon en la popolo. Oni alpaŝis al starigo de gvidorganoj. En multaj urboj kaj vilaĝoj estis elektitaj komitatoj, konsistantaj el komunistoj kaj senpartiaj. Ankaŭ en la grandaj entreprenoj kaj fabrikoj oni fondis grupojn de la Patrolanda Fronto. Ili sabotis la produktadon. En la grandaj urboj la komitatoj de Patrolanda

Fronto organizis protestajn demonstraciojn kontraŭ la mizeraj vivkondiĉoj.

Por plifortigo de la Patrolanda Fronto grave helpis la partizanaĵa taĉmentoj, ili disvastigis la Programon en la vilaĝoj, fondis komitatojn kaj varbis helpantojn, kiuj provizis la partizanojn per provianto, vestoj, medikamentoj ktp. En la lando komenciĝis revolucia leviĝo — strikoj, demonstracioj. En Pleven, Sliven, Varna, Plovdiv oni sturmis la malliberejojn kaj liberigis la politikajn malliberulojn.

En la nokto inter la 8-a kaj 9-a de septembro 1944, laŭ plano de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj de la Nacia Komitato de la Patrolanda Fronto, sub la gvido de la Ĉefa Partizana Stabo revoluciaj soldatoj kaj partizanoj sturmis la registarajn ejojn kaj okupis ilin. Je la 9-a de septembro matene Radio Sofio disaŭdigis deklaron de la registaro de la Patrolanda Fronto. En la tuta lando la regpotenco transiris al la Patrolanda Fronto.

La plensukcesa kontraŭfaŝista ribelo je la 9-a de septembro 1944 estas unu el la plej gravaj eventoj en la 13-jarcenta historio de Bulgario. La ribelo renversis la kruelan faŝistan diktaturon. La ribelo malfermis la vojon al libera vivo, demokratio kaj progreso.

Tiutempe antaŭ la Patrolanda Fronto staris amaso da taskoj: gajni la fidon de Sovetunio kaj de la najbaraj landoj; partopreni en la milito je la flanko de la Soveta Armeo.

Laŭ iniciato de la Patrolanda Fronto oni varbis volontulojn. Pli ol 200 mil junaj bulgaroj aliĝis al la popola armeo kaj heroe batalis kontraŭ la hitleranoj sur juĝoslava teritorio, en Hungario kaj Aŭstrio. Per tio nia lando helpis por pli rapida frakaso de la germana militmaŝino.

Tuj post la fino de la milito la Patrolanda Fronto alvokis la bulgaran popolon al laboro por restarigo de la nacia ekonomio.

Rimarkinda estis la kontribuo de la Patrolanda Fronto por organizo de agrikulturaj kooperativoj, por enkonduko de socialismaj labormetodoj en la vilaĝojn. Grandan laboron faris ties aktivuloj por likvido de la alfabeteco en nia lando.

Antaŭ la lando staris solvendaj taskoj: forigi la monarkion, proklami respublikon kaj ŝanĝi la konstitucion. Post tutpopola referendumo por forigo de la monarkio je la 4-a de decembro 1947 la parlamento oficialigis la respublikon.

Laŭ la nova Konstitucio estis naciigitaj la privataj industriaj entreprenoj, minejoj kaj bankoj. Estis likviditaj la privataj firmaoj por komerco kun eksterlando.

Grandaj estas la meritoj de Georgi Dimitrov por stabiligo de la Patrolanda Fronto, por ke ĝi povu ludi tiel gravan rolon en la socia vivo de la lando. Sub lia gvido estis ellaborita la programo de la Patrolanda Fronto.

Post sia reveno en la patrujon (5. 11. 1945) G. Dimitrov plu zorgis pri la fortikigo de la Patrolanda Fronto.

La II Kongreso de la Patrolanda Fronto aprobis novan Programon, adaptitan al la ŝanĝoj en nia lando, ĝi skizis la perspektivojn de soci-politika, ekonomia kaj kultura evoluo. La kongreso unuanime elektis Georgon Dimitrov kiel prezidanton de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto. Dimitrov deklaris, ke la Dua Kongreso plenumis vere historian rolon kaj estas eksterordinare grava etapo sur la vojo al feliĉa estonto.

Nova etapo en la evoluo de la Patrolanda Fronto komenciĝis post la Julia Plenkunsido de la Centra Komitato de BKP en 1968. En sia raporto antaŭ la Plenkunsido T. Jivkov diris: „En la nuna etapo la Patrolanda Fronto, ne ŝanĝante sian karakteron de soci-politika

organizaĵo, devas esence revizii la enhavon de sia agado, devas trovi pli efikajn formojn. Ĝi devas forlasi tiujn metodojn, formojn kaj rimedojn, kiuj jam malaktualigis...“

Inter alie la Plenkunsido rekomendis al la Patrolanda Fronto, ke estonte ĝia Nacia Konsilantaro havu la rajton proponi al la Parlamento leĝojn, kiuj koncernas la tutan popolon, kaj kontroli la oficejojn kaj institutojn, kiuj zorgas pri komunumaj kaj komercaj aferoj.

Laŭ decido de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda Fronto estis akceptitaj kiel ĝiaj kolektivaj membroj 27 amasaj kaj kulturaj organizaĵoj — inkluzive la Bulgaran Esperantistan Asocion.

La XII Kongreso de BKP rekomendis pluajn taskojn al la Patrolanda Fronto. En la raporto, traleĝita de kamarado Todor Jivkov, estas konstatite:

„En la proceso de plenumo de la decidoj de la Dekunua partia kongreso la Patrolanda Fronto kiel plej amasa soci-politika organizaĵo kaj tutpopola movado pliriĉigas kaj plivastigas siajn agadkampojn, realigas gravajn praktikajn taskojn de la loĝantaro kaj de la lando, ĉiam pli kaj pli unuigas komunistojn, organizitajn agrarpartianojn kaj senpartianojn, la tutan bulgaran popolon ĉirkaŭ la politiko de la Partio.“

Per tio komenciĝis nova etapo en la evoluo de la Patrolanda Fronto — laŭ la rekomendoj de Georgi Dimitrov. La ĝisnuna evoluo montas, ke ĝi estas potenca batalunuigo de la laborista klaso, de la kamparanoj kaj la popola intelektularo; organizaĵo, en kiu agadas komunistoj, agrarpartianoj kaj senpartianoj. Ĝi estiĝis la plej amasa apogo de la partio kaj de la popola registaro en la laboro por konstruado de la socialismo, skolo por komunisma kaj pairiotisma edukado.



LA DIMITROV-MUZEO EN LEJPCIGO



La Dimitrov-muzeo en Lejpcigo

La iama Supera Tribunalo de Germanio nun estas Dimitrov-muzeo kun mondhistoria valoro. Ĝi ekzistas depost 1952. Tie estas konservata la revolucia heredaĵo de Georgi Dimitrov kaj la tradicioj de la germana, bulgara kaj internacia laborista movado. En la konstruaĵo troviĝas 15 ekspoziciaj ĉambroj.

En ĉambro A la vizitantoj informiĝas pri la vivo de Dimitrov de 1882 ĝis 1902. Oni vidas modelon de lia naskiĝdomo en v. Kovačevci. Kiel juna preslaboristo li aliĝis al la revolucia laborista partio. Tio estis tre grava momento en lia vivovojo.

En ĉambro B estas prezentita la periodo 1902–1917. Tiutempe Dimitrov fariĝis gvidanta funkciulo de la bulgara laborista movado. Li estis membro de Bulgara Laborista Socialdemokrata Partio (tesni socialisti*). En 1906 li estas gvidanto de la unua granda minista striko en Pernik, kie li estis arestita. Ekde 1909 Dimitrov reprezentis la partion ĉe internaciaj kongresoj. Ekde 1913 li agadis en la Sofia Urba Konsilantaro.

En ĉambro C oni informiĝas kiel pasis lia plua vivo de 1917 ĝis 1923. Dimitrov renkontis Lenin. Li partoprenis la Trian Kon-

greson de la Komunista Internacio en 1921.

Ĉambro D. Dimitrov gvidas la unuan kontraŭfaŝisman ribelon en 1923. Post ĝia frakaso li devis vivi eksterleĝe. Li elmigris al Vieno (Aŭstrio). En eksterlando Dimitrov organizis protestan movadon defende al la bulgara popolo. Viktimo de la faŝista teroro estis lia frato Todor Dimitrov. Dume Georgi Dimitrov estis foreste kondamnita al morto en Bulgario.

La ĉambro E ampleksas la periodon 1923–1932. En Berlino Dimitrov ricevis eksterleĝan loĝejon. Tie li laboris kiel funkciulo de la Komunista Balkana Federacio.

En ĉambro F ni ekkonas lin kiel organizanton de la kontraŭmilita mondkongreso en Amsterdamo (Nederlando).

En ĉambro G oni pritraktas la starigon de faŝisma diktaturo en Germanio kaj la bruligon de la parlamentejo. Ankaŭ la bulgarajn komunistojn Dimitrov, Popov kaj Tanev oni eksuspektis kaj akuzis pri la krimo kaj malliberigis ilin. Antaŭ la juĝproceso ili estis transportitaj en la arestejon de Lejpcigo.

En ĉambro H oni vidas la rekonstruitan malliberejan ĉelon de Dimitrov. Krome oni konatiĝas kun la protestmovado por la savo de Dimitrov kaj liaj kamaradoj kaj kun la tiel nomata „Bruna Libro“ pri la bruligo de la parlamentejo.

En la ĉambroj K/L oni prezentas la juĝprocezon. Akuzitoj estis la nederlandano Marinus van der Lubbe kaj la komunistoj Torgler, Dimitrov, Popov kaj Tanev. La polemiko fare de Dimitrov kaj la internacia protestmovado devigis la juĝantaron liberigi la akuzitojn. En la historia halo oni aŭskultas la surbendigitan disputon inter Dimitrov kaj Göring.


En ĉambro X oni komunikas, ke la liberigita Dimitrov, la heroo de Lejpcigo loĝis ĝis novembro 1945 en Sovetunio kaj aktivis kiel komunista funkciulo.

En ĉambro M oni konatiĝas kun Dimitrov kiel parolanto de la ĉefraporto en la VII Kongreso de la Komunista Internacio (1935).

Ĉambro N. Dimitrov emfazas la signifon de Sovetunio por la kontraŭfaŝista batalo.

En ĉambro O/P ni legas, ke en Bulgario oni fondis en 1942 la Patrolandan Fronton sub la gvido de Dimitrov. Post la Septembra

* Tesni socialisti — striktaj socialistoj



La juĝhalo en la Dimitrov-muzeo

DIMITROV

Ĉe Mar' Egea en urbo Ksantio, fama per sia
tabako,
proletoj kun ftize flavaj vizagoj sidis en iu
barako.
Dekjara knabo mi — tabaknovico — tie Di-
mitrov ekonis,
kiam li verve pri venka ribelo de bolŝevikoj
rakontis.

Kvin jaroj pasis. Denove aŭskultis mi lin en
domo Popola
(en Plovdiv ĉe la rivero Marica): — Ĉiuj
gefratoj al glora
batalo levu sin por pli da pano, kontraŭ la
eksploatantoj! —
ektondris voĉ' kuraĝiga de l'energia proleta
gvidanto...

Ribeli pretis ni kontraŭ potenco de monarkio
malmajesta.
Ŝancelis tamen la lokaj gvidantoj, ĝis ilin
oni arestis.
Tamen honoron partian savis Dimitrov, Kola-
rov kaj Genov:
en nord' de l' lando ribelo ekflamis kontraŭ
faŝistaj katenoj!

Mi lin admiris, dum pledis li antaŭ la tribu-
nalo nazisma.
Li senmaskigis sentime la verajn incendiin-
tojn de Reichstag
kaj laŭdis sian popolon bulgaran! Ni laŭ par-
tia alvoko
plenvoĉe protestis: — Liberon al Georgi Di-
mitrov, Tanev kaj Popov!

Ribelo je la 9-a de septembro 1944 la faŝisma
reĝimo estis forigita. En 1945 Dimitrov fari-
ĝis ĉefministro de Bulgario. Je la 2-a de
julio 1949 li mortis.

Oni povas konstati, ke la Dimitrov-muzeo
en Lejpcigo, amikece ligita kun la Nacia
Muzeo „Georgi Dimitrov“ en Sofio, per sia
konstanta ekspozicio donas unikan bildon
pri la vivo kaj agado de la granda batalanto
kontraŭ la milito kaj faŝismo.

Oskar STOLBERG (GDR)

H. M. ĤRIMA

Al mi penetris tra muroj prizonaj lia rapor-
to, legita
de la tribuno de l' Sepa Kongreso de Komin-
tern' unika:
Kontraŭ la pesto faŝisma ekzistas solstola al-
ternativo —
unuigitaj en fronto popola luktu ni por inda
vivo!

Sub la standardo de Front' Patrolanda iris
mi al partizanoj.
Septembro, mil kaj naŭcent kvardekkvara.
Kaptis mi radiogramon.
Dimitrov vokas ribeli! Nin helpas Ruĝa Ar-
meo el nordo.
Sin levis la klaso proleta. Descendis la parti-
zanoj de l'montoj!

Mi lin aŭskultis dum Kvina Kongreso de la
Partio komunista.
Avertis li la delegitojn gardi sin de opti-
mismo:
— La voĵ' al nova socio ne estas glata pa-
vimo surstrata,
obstakloj estos, sed fine ni venkos, kreos la
ordon revatan!

En ĉerk' purpura mi vidis lin laste antaŭ
maŭzoleo blankŝtona.
Preter li marŝis dum tago kaj nokto homaj
funebraj kolonoj.
Kun pugnoj alten levitaj gevojro juri plu iri
la vojon,
montritan al ni de Georgi Dimitrov — vojo
al bela estonto!

Al la hela evento en la vivo de la bulgara popolo — la celebrado de la 100-jariĝo de Georgi Dimitrov, la bulgaraj esperantistoj kontribuas per aperigo de du libroj pri la glora filo de la bulgara popolo*.

La aŭtorino de la libro „Georgi Dimitrov. Kunciza biografio“, la konata historiistino Petra Radenkova, tre ŝpareme, sed sencoplene rakontas pri la agado de l'eminenta filo de la bulgara laborista klaso en daŭro de duonjarcento. Ĉio estas atentokapta: unuaj paŝoj en la laboristaj bataloj, rekonita gvidanto de la sindikata movado enlanda, arda parlamentano kaj magistratano, fama aganto kaj gvidanto de la internacia laborista kaj komunista movado. Sed aparte altiras la paĝoj pri la giganta batalo de Georgi Dimitrov kontraŭ la Hitler-nazismo dum la Lejpciga juĝproceso. Flue kaj klare estas eksponitaj liaj ideoj pri la unuefronto de la laboristaro kaj la vasta popola fronto kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio, validaj ankaŭ nun. La agado de Georgi Dimitrov en lia patrujo — Bulgario post 23-jara politika elmigrado eksterlanden kronas la libron.

La libro estas flue legebla (por tio kontribuas ankaŭ la bonega traduko de N. Aleksiev). Ĝi helpas kompreni la personecon de tiu titano de nia epoko.

La libro „Georgi Dimitrov pri Esperanto-movado kaj pachtalo“ estas alispeca. Parto de ĝi estas sciencesploroj, parto — personaj rememoroj. Tre valora estas la ĉapitro „Georgi Dimitrov pri la Esperanto-movado“ (presita

ankaŭ en la libro de P. Radenkova kiel enkonduko). Ni, la esperantistoj, povas vaste uzi ĝin en nia poresperanta aktivado. Vastan prilumon pri la partopreno de bulgaraj esperantistoj en la batalo defende al Georgi Dimitrov kaj liaj akuzataj kamaradoj en la Lejpciga juĝproceso donas la ĉapitro „Infero scenaro — kontraŭ titanon“.

En alia ĉapitro reliefigas la kolosa batalo de Georgi Dimitrov por paco, afero aktuala kaj plej grava por la nuna momento. Kortuŝa estas la rakonto de la aŭtoro pri la lasta adiaŭo kun la granda homo.

La libro estas tradukita en modela Esperanto, kio plialtigas ĝian valoron.

Eble estas interese por la leganto scii, ke en 1962 en Esperanto aperis 211-paĝa biografio de Georgi Dimitrov, verkita de Stela Blagoeva, filino de Dimitar Blagoev, la fondinto de la klasbatala partio de la bulgara laboristaro. En Esperanto aperis ankaŭ la libro de Georgi Dimitrov „La laborista klaso kontraŭ la faŝismo“, 1936, 170 p., nun bibliografia raraĵo.

KR. KARUCIN

* Petra Radenkova. Georgi Dimitrov. Kunciza biografio. Tradukis el la bulgara Nikola Aleksiev. Sofia—Pres, 1982, 68+16 p.

Nikola Aleksiev. Georgi Dimitrov pri Esperanto-movado kaj pachtalo. Skizoj kaj rememoroj al la 100-jara Dimitrov-jubileo. Sofia. Bulgara Esperantista Asocio, 1982, 38+9 p.

OMAGE AL GEORGI DIMITROV

Sofio. „Estas feliĉo feliĉigi la aliajn!“ Per tiuj vortoj Verka Stejner, sekretariino de la novekreita E-societo „Penka Mihajlova“ ĉe II urba regiono — Sofio, salutis la kantistojn de la Esperantista horo kaj ilian horestron D. Terziev, kiuj partoprenis la solenan kunvenon de la societo. La solenaĵo estis dediĉita al la 100-jara datreveno de la gvidanto de nia popolo Georgi Dimitrov. Pri lia mirinda vivo emocio prelegis B. Nedkov.

La horo plenumis riĉan programon precipe en Esperanto. Kortuŝa programero estis „Kanto de la vanto“ — la ŝatata kanto de G. Dimitrov, kiun la ĉeestantoj entuziasme kunkantis!.

La fervojista E-societo „Prospero“ en Sofio okazigis solenan kunvenon, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov.

La preleginto B. Nedkov rakontis pri la vivo de nia popolgvidanto kaj instruanto Dimitrov. Li memorigis karakterajn momentojn, kiuj restos por ĉiam en la historio de la partio kaj de la bulgara popolo.

Membroj de la societo plenumis modestan artan programon.

L. Koleva

Antaŭ nelonge la elstara esperantisto-veterano Asen Grigorov renkontiĝis kun orkestranoj el la Nacia Teatro por Opero kaj Baletto en Sofio. Iama persona sekretario de Georgi Dimitrov, li rakontis siajn rememorojn pri la rimarkinda personeco de la instruanto kaj gvidanto de la bulgara popolo, rakontis interesajn detalojn pri ilia komuna laborado.

Asen Grigorov substrekiis la grandan amon de Georgi Dimitrov al la muziko kaj lian estiĝon al la agantoj de la arto.

M. Ĉobanov

Bankja. En la pasinteco bulgaroj nomis Lejpcigon Lipiska (pro ĝia simileco kun la slavdevena bulgara vorto „lipa“ — tilio. Por eternigi la venkon de Georgi Dimitrov super la faŝismo en Lejpciga juĝproceso kaj honore al la 100-jariĝo de la gvidanto kaj instruanto de la bulgara popolo, la esperantistoj el Bankja plantos 100 arĝentfoliajn tiliojn.

B. Atanasov

SKIZOJ SEN RETUŜO

(Rememoroj de la E-veterano Ivan Ŝvarov)



LA TREZORO

La letero de la redaktoro de „BE“ metis min „en pozicio de ŝako“. Oni petas min en plej mallonga limtempo verki kaj sendi por publikigo miajn rememorojn okaze de la 75-jara jubileo de BEA. Kiel ĵurnalisto mi scias, ke la mallongajn materialojn oni preferas; kaj tamen oni ne povas nur diri: „La homo naskiĝas, suferas kaj mortas...“

En mia domo estas nek oro, nek argento, nek diamantoj. Estas subtegmenteĵo, kie estas ĉiuj necesaj. Tien mi metas miajn pentraĵojn post ĉiu mia ekspozicio, tie kuŝas amasoj da miaj skribaĵoj kaj ĵurnalistaj notkajeroj, tie en kofroj kaj kartonkestoj kuŝas ankaŭ mia privata arkivo. Tiu ĉi ne tre agrabla kaj malluma loko estas mia trezorejo.

Mi proksimiĝas al du kestoj plenaj de esperanta literaturo kaj pense reiras 59 jarojn malantaŭen. Sur unu paperujo estas skribite: „Prelegoj, artikoloj, tradukoj“, sur alia „Kongresoj, konferencoj, plenkunsidoj“ sur tria — „Lecionoj por komencantoj kaj progresintoj“. . . En kelkaj ligoj estas materialoj pri MEM, diversaj esperantaj ĵurnaloj kaj gazetoj, bultenoj, broŝuroj, afiŝoj, specialaj E-eldonoj, memoraroj, jubileaj markoj de kongresoj k. a. Jen estas du grandaj skatoloj, plenaj de ilustritaj poŝtkartoj el la tuta mondo, albumoj kun fotoj de kongresoj, renkontoj, ekskursoj. . . Ĉio estas antaŭ miaj okuloj: renkontiĝoj kun malnovaj fremdlandaj gekonatuloj; mi vidas la Fiŝistajn Turojn respeguli en la akvo de Danubo, la velŝipojn en Balatono. . .

Jam preskaŭ 60 jaroj Ivan Ŝvarov estas aktivulo de la bulgara E-movado. Kiel esperantisto Ivan Ŝvarov komencas sin okupi pri ĵurnalistiko kaj iom post iom li estiĝas profesia ĵurnalisto.

Sed estas malfacile diri kiu estas la preferata okupo de la multflanke talentita Ŝvarov, ĉar multan tempon li dediĉas ankaŭ al la beleto kaj al la pentroarto. Membro de la Unuiĝo de la Verkistoj en la Provinco, Ivan Ŝvarov estas aŭtoro de kolekto de rakontoj „Skizoj sen retuŝo“ (1941).

Fondinto kaj sekretario de la Distrikta Komitato por Defendo de la Paco, Ivan Ŝvarov estas elektita membro de la Estraro de MEM. Pro liaj meritoj en tiu agadkampo li estas honorita per multaj distingoj de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco.

Pro lia multflanka kultura aktivado Ivan Ŝvarov estas distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — II grado.

Al la esperantistoj en Plovdiv Ivan Ŝvarov estas konata kiel fondinto de la Distrikta Esperanto-Komitato kaj kiel lia unua prezidanto. Ni proponas al niaj legantoj la speciale por „BE“ verkitaĵojn rememorojn de la veterano de la Bulgara E-movado, honora membro de BEA kaj aktivulo de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv Ivan Ŝvarov.

Mi laciĝas pro rememoroj. Kiel grajnoj de rozario ili pasas antaŭ miaj okuloj unu post la alia.

KIEL MI ESTIĜIS ESPERANTISTO

Trista aŭtuno. La kamparo estis dezerta. La vento fajfis tra la nudaj branĉoj. La tero estis kovrita per flavaj folioj. Trista aŭtuno, la homoj iris mutaj kaj en ĉies rigardoj estis kaŝita malĝojo.

Estis 1923-a jaro.

La kontraŭfaŝista ribelo estis kruele frakasita. Sur la montetoj en Plovdiv ne plu gardostaris soldatoj. La monteto „Bunarĝik“ memorigis al mi pri mia antaŭnelonga aresto. Kun tiaj malgajaj pensoj mi ekmarŝis al „Saĥat-tepe“. En miaj oreloj sonis la vortoj de iu ĉefo el la sukerfabriko: „Ĉiuj laborlokoj por malsargado de sukerbeto estas jam okupitaj“. Ĉe la unua rando de la monteto oni disbatis la rokojn. La ŝtonhakistoj per metalaj stangoj translokigis la grandajn ŝtonblokojn, el kiuj oni faris pavimŝtonojn. La homo venkis la graniton. Junulo kun senkoloriginta kaskedo transportis kestetojn kun akritigitaj ĉiziloj. De tempo al tempo li elpoŝigis falditan papereton, legis ĝin kaj metis ĝin en la alian poŝon. Ni komencis interparoli kaj li klarigis al mi: „Mi legas la libron „La vojo returne“ de Remark en Esperanto. Mi skribas la nekonatajn vortojn sur paperpecojn. Translokiginte ilin kelkfoje el unu poŝo en alian, mi memorfiksas ilin.“

Mi forlasis la ŝtonfosejon ne ĉesante pensi: „Ordinara ŝtonhakisto kaj legas Remark esperantlingve! Kial ankaŭ mi, la senlaborulo, ne ellernu tiun ĉi lingvon?!“ . . .

1924 jaro. Flugfolioeto vokis: „Esperanto en dek lecionoj“. Mi enskribigis en la kurso. Instruis Dimitr Malčev. La kursanoj malmultigis kaj la lasta leciono okazis ekstere, sub la arbusto de sovaĝa rozo, malantaŭ „La Groto“ en la ĝardeno.

„Ĝis revido!“ — Ĉu nur ĝis tie? — Ne. Mi daŭrigis la lernadon sola. Mi metis la verdan stelon surbruste. Mi renkontigis kun la ŝtonhakisto. Li inspiris al mi kuraĝon.

Foje, promenante en la ĝardeno, mi renkontis estaturan simpatian maljunulon kun esperanta insigno sur la refaldo de la jaketo.

— Saluton! — salutis ni unu la alian kaj sidigis sur la benko.


Mi komprenis lin, sed mi parolis singene, mallerte.

— Ne malesperigu — diris li al mi. — Kuraĝon!

Pli malfrue mi eksciis, ke mia nova konato estas Georgi Oreškov, aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto por bulgarioj. Mi lin ne vidis plu.

Mi komencis haltigi ĉiun, kiu portis la verdan insignon. Esperantistoj el aliaj urboj, el eksterlando, germanoj, nederlandanoj, poloj...

Post sia vojaĝo en la Oriento venis en Plovdiv la familia paro Jeland el Londono. Li — ĵurnalisto, ŝi instruistino de fremdaj lingvoj. S-ino Jeland malfermis kurson de franca lingvo per Esperanto. Li verkis artikolojn en E-gazetoj kaj ĵurnaloj. Foje ni renkontigis sur la ĉefstrato. Mi proponis, ke ni kune vizitu la antaŭ nelonge malfermitan agrikulturan ekspozicion. Laŭ instigo de Jeland mi verkis artikolon pri ĝi, kiun Jeland promesis sendi al „Heroldo de Esperanto“. Post nelonge Jeland montris al mi la gazeton, en kiu havis sian lokon ankaŭ mia artikolo. Tiel komenciĝis mia ĵurnalista laboro.



Grafikaĵo de Ivan Ŝivarov

VOĈOJ DE MALPROKSIME.

LA POLICO VIGLAS

En la E-gazetoj kaj ĵurnaloj, kiujn mi ricevis, mi tradukis la plej interesajn materialojn kaj mi publikigis ilin en Plovdiv kaj Sofiaj gazetoj. Honorarion oni ne pagis. Pli interesaj estis la tradukoj: „La batalo de la hinda popolo kontraŭ la koloniismo“, „La batalo de la popoloj kontraŭ la kemia milito“, „La soveta vivmaniero“, „Rakontoj pri aktualaj temoj“ k. a.

La tradukoj el Esperanto en bulgaran lingvon ne nur informis la legantojn pri tio, kio okazas ekster Bulgario, sed ankaŭ popularigis la Internacian Lingvon kaj la intereso al ĝi kreskis.

La registaro opiniis, ke Esperanto estas „komu-



Sur la foto de maldekstre: Dimitar Malčev, Penko Stoev kaj Ivan Ŝivarov

nista afero“ tial la E-agado estis sub polica observado. E-societo „Kulturo“ estis devigata sekvi politikon de neŭtraleco. La kreita laborista E-societo devis ĉesigi sian agadon. Por ĉiu kunveno aŭ eciono de Esperanto ni devis peti permeson, kaj en la kunvenoj ĉeestis policano.

Foje mi iris por permeso en la policon. Oni skribis ĝin, la ĉefo forestis — do li ne povis subskribi ĝin. La policano diris al mi fari la lecionon sen leterpermeso, ĉar estis neniu, kiu povus subskribi la leteron. Tamen dum la leciono eniris policano, forpelis la kursanojn kaj min — ondukis en la policejon. Oni faris protokolon pri malobeo kaj monpunis min.

Penko Stoev, vicprezidanto de la banko, ordigis la aferon, sed pere de li mi ricevis rekomendon ne plu okupiĝi pri Esperanto.

Komenciĝis la traserĉadoj. Ĉirkaŭ la 4-a horo matene. Brutale la policanoj disŝiris, forĵetadis, konfiskadis — multaj libroj, gazetoj, ĵurnaloj kaj leteroj estis neniigitaj. Nur la kredo je la estonteco ne estingigis!...

Ivan ŜIVAROV

ABNEGACIE, KUN ENTUZIASMO...

(90 jaroj depost la naskiĝo de la esperantisto-veterano
Meleško ŠIŠKOV)

Certe ne ekzistas sofia, eĉ bulgara esperantisto, kiu ne konas proksime la veteranon de la bulgara E-movado Meleško Šiškovi.

Baj¹ Meleško — tiel varme kaj kun estimo sin turnas al li ĉiuj. Kaj en ĉi tiu alparolo oni legas kaj dankemon kaj miron pri ĉio, kion tiu ĉi malgrasa kaj fortika homo, pasinta tra la infero de naŭ jardekoj, faris por la bulgara E-movado kaj por la revolucia movado en Bulgario.

La sofiaj esperantistoj ligas la historion de sia organizaĵo kun la varolega kontribuo de baj Meleško, la homo, kiu ne sentante la jarojn sur siaj ŝultroj, estas ĉiam eĉ sia batalposteno. Li disvastigis esperantan literaturon, proponis la plej novajn eldonojn, propagandajn materialojn, insignojn k. a., kolektis la membrokoton. Oni tiel kutimiĝis al lia ĉeesto, ke irante al kunveno aŭ iu alia iniciato de la sofia esperantista organizaĵo, ĉiuj atendas vidi sian bonan amikon, instruiston kaj kamaradon baj Meleško. Kun du pezaj sako surŝultre, kiujn eĉ juna homo malfacile povus porti, baj Meleško Šiškovi disportas la lumon de la esperanta kulturo, por pliriĉigi per ĝi siajn malnovajn kaj novajn kamaradojn.

Pli ol sep jardekojn de sia vivo apartigis Meleško Šiškovi al la revolucia batalo por popola feliĉo, al la ideo por internacia kompreniĝo kaj kunlaborado. En ĉi tiu batalo li havis la plej fortan armilon — la partian justecon, la komunistan konvinkitecon kaj la kredon je la humaneco de Esperanto.

Naskita en malriĉa vilaĝana familio en la limoj de Trakio, ankoraŭ infano li ekkonas

la malsaton, senlaborecon, ekspluatadon, teroron kaj minacon de la faŝistaj regantoj. Kiel laboristo-kudristo de litkovriloj, li estis unu el la organizantoj de la sindikata movado inter siaj kamaradoj el tiu ĉi branĉo.

La konatiĝo de Meleško Šiškovi kun Esperanto plivastigas lian horizonton, pliriĉigas liajn konojn pri la mondo, firmigas lian decidon servi per ĝi al la progreso. Li estigas unu el la kreantoj de la bulgara esperanta laborista movado.

Meleško Šiškovi pasis tra ĉiuj suferoj de la faŝista teroro, sed li estis feliĉa renkonti la liberecon kaj fondon ĉiujn siajn fortojn al nova, socialisma Bulgario.

La ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Velevo parolis pri la vivo de la jubileulo, kaj k-do Nikola Aleksiev rakontis siajn rememorojn pri baj Meleško el lia revolucia batalo kaj agado kiel esperantisto.

Oni legis la dekreton de la Prezidentaro de la Parlamento por distingo de Meleško Šiškovi per la plej alta ordeno de Popola Respubliko Bulgario — „Georgi Dimitrov“. Oni legis ankaŭ la personan leteron de la unua partia kaj ŝtata gvidanto k-do Todor Jivkov al la jubileulo okaze de lia naŭdekjariĝo.

En la nomo de la urba estraro de BEA al la jubileulo estis prezentitaj speciala adreso, floroj kaj donacoj. Salutparolojn, florojn kaj donacojn al baj Meleško oni prezentis en la nomo de ĉiuj regionaj E-organizaĵoj en la ĉefurbo, en la nomo de liaj multnombraj admirantoj.

Haim LEVI

¹) Baj — estimplena alparolo al pli aĝa viro

KONKURSO PRI ESPERANTA LERNOLIBRO

La Juĝkomisiono de la Konkurso por Lernolibroj, aprobita de la Buroo de la Centra Estraro de BEA konsistanta el la supera scienca kunlaboranto Vasil Bozarov (prezidanto), Marin Bacev (sekretario), Valka Dankova (Popovo), Penka Kateva (Veliko Tarnovo), Hristo Manolov (Polski Trambes), Canko Murgin (Ŝumen) kaj Maria Pejškova (V. Tarnovo), kunsidis la 9-an de aprilo 1982, sumigis la pritaksajn, fari-tajn de ĉiu komisionano post detala pristudo de la ricevataj projektoj por lernolibroj kaj aljuĝis jenajn premiojn:

- I. Projekto de lernolibro por komencantoj
 1. Violin Oljanov (Sofio) — unua premio,
 2. Vasil Markov (Loveĉ) — dua premio,
 3. Nikola G. Petkov (Tolbuĥin) tria premio.
- II. Projekto de lernolibro por progresintoj (dua grado)
 1. Violin Oljanov (Sofio) — unua premio,
 2. Ne estis aljuĝita dua premio,
 3. Miroslav Jujin (pseŭdonimo) — tria premio.

La Komisiono decidis proponi al la Centra Estraro de BEA eldoni la lernolibrojn ricevintajn unuan kaj duan premion.

Krome la Komisiono sciigas, ke venis entute sep projektoj de lernolibroj, el kiuj kvar por komencantoj kaj tri por progresintoj.

INSTRUISTOJ SUR LA BENKOJ DE LERNANTOJ...

En la koridoroj de la Teknikumo pri Nutraĵindustrio „Prof. d-ro G. Pavlov“ en Sofio regas silento. Kaj dum mi demandis min kie okazas la lecionoj de Esperanto, neatendite el iu ĉambro aŭdiĝis rido. . . Evidentiĝis, ke la bonhumoro ĉeestas kiel elemento por ripozo en la lernohoroj de la longjaraj instruistoj Mihail Elenov kaj Marin Bacev.

En la du kursoj por E-lerntoj, organizitaj de la Sofia Distrikta Estraro de BEA kaj de la Distrikta Konsilantaro por Popola Klerigo, sur la benkoj sidas plejparte instruistoj el la mezlernejoj en la distrikto. Goĝiga estas la fakto, ke la pliparto el ili estas junaj specialistoj kun supera klereco — precepte filologoj.

Kiamaniere estas efektivigita tiu ĉi elekto, kiu provokas la noblan envion de ĉiu organizanto de similaj kursoj? Ĉar ne estas sekreto, ke pro la akra bezono de E-instruistoj oni altiras al la kursoj ankaŭ personojn sen pedagogia kaj filologia klereco, ne ĉiam konvenajn laŭ aĝo. Por fari sian „selekton“, Zahari Ivanov — organizanto de la kurslaboro en la Sofia Distrikta Estraro de BEA, elektis la plej malfacilan, tamen plej certan vojon — „apostolan“ migradon de urbo al urbo, de vilaĝo al vilaĝo, de lernejo al lernejo. Kaj se vi demandus iun el la kursanoj kiom da personoj, kiuj komencis lerni la lingvon, rezignis pri ĝia plua lernado, tiu respondus al vi kvazaŭ ŝerce: „Sed Zahari Ivanov? Li ne permesas! Ni estas kvardek da personoj, li konas ĉiun el ni, kontrolas la rezultatojn de nia laboro.“

Eble tio estas la vojo al plia junigo kaj popularigo de nia movado — vasta agitado kaj propagando, diferencigita rilato al la esperantistoj-komencantoj kaj batalo por ĉiu el ili.

En kia stato troviĝas la preparado de E-kadroj en Sofia distrikto? Sed ni donu la parolon al **Zahari Ivanov** mem:

— En la du instruistaj kursoj partoprenas reprezentantoj de ĉiuj komunumoj. Slivnica, Ihtiman, Kostenec, Dolna Banja, Kostinbrod kaj Samokov sendis po kelkaj personoj, kaj Srednogie kaj Botevgrad — nur po unu persono. La celo estas — jam en la venonta jaro la nunaj kursistoj instruu Esperanton en la lernejoj, kie ili laboras. Tial la instruoprogramo estas streĉita, por instruado oni profitas la dimanĉojn. Dum la vintra kaj printempa ferioj okazis unusemajnaj ĉeestaj okupoj, kiuj dum la somero estos 20-tagaj. Niaj estontaj instruistoj partoprenos ankaŭ la internaciajn kursojn por lingva perfektigo, kiuj okazos en Hungario.

En la momento E-kursoj funkcias en Kostenec, Ihtiman, Botevgrad kaj Koprivštica, kaj fakultative la lingvon oni studas en la mezlernejoj en Godeč, Svoĝe, Botevgrad, Koprivštica, Ihtiman, Kostenec kaj Samokov. Ĉe organizo de la instruado ni serĉis la helpon de la komunumaj komitatoj de BKP kaj la Komsomolo. Tiurilate tre valora estis la helpo en Ihtiman, Kostinbrod, Koprivštica, Srednogie. Eĉ en Kostenec la komso-



Gekursanoj kaj instruistoj dum okupoj

molanoj okupiĝis pri la varbado de kursistoj.

Kio fakte estas la Internacia Lingvo por la estontaj instruistoj de Esperanto?

Ilija Asparuhov — instruisto de korpakulturo en elementa lernejo „Otec Paisij“, vilaĝo Petarĉ, esprimis la komunan opinion: ankoraŭ unu specialiĝo! Por **Ilija Balabanova** el la Politeknika gimnazio „Diĉo Petrov“ en Svoĝe Esperanto estas malnova revo — en la infanaĝo ŝi memstare lernis la lingvon kaj nun plezure reokupigas pri ĝi. Kaj **Stoil Nikolov** — instruisto de rusa kaj franca lingvoj en la Teknikumo de Mekanoelektrotekniko „Hristo Botev“ en Botevgrad jam vivas kun la problemoj de estonta instruisto de Esperanto:

— Mi preparas min venontjare instrui Esperanton en la teknikumo. Mi jam pripensas kiamaniere altiri al la kurso pli da infanoj, kiel motivi la necescon lerni la lingvon kaj kiel poste ilin reteni.

Eble respondo al tiu ĉi demando donas per sia pedagogia praktiko **Mihail Elenov**:

— Ni, la gvidantoj de la tiel nomita instruista kurso strebas fari ne nur utila, sed ankaŭ agrabla la tempon dum la lernohoroj, prezenti la lernomaterialon ne kiel deviga leciono, sed kiel interesa ekkono de novaj faktoj el la vivo. Ni provas montri al niaj „lernantoj“ kiel oni devas instrui Esperanton. Nun plej grave estas, ke ili ekkredu je

siaj fortoj. Tial al ses el ili ni proponis fari lecionon antaŭ siaj gekolegoj. La rezulto estis bona. Nature, ĉe tiu ĉi kontrolo leciono grava estis ankaŭ la akirita pedagogia sperto. Ni kredas, ke niaj kursanoj estiĝos bonaj instruistoj de Esperanto, ĉar ili lernas diligente kaj tio estas tute natura — ja ili venis ĉe ni laŭ sia propra deziro. Ni kun mia kolego Marin Bacev plenumos nian instruistan mision, se niaj nunaj „lernantoj“ ekposedos

perfekte la lingvon, por ke ĝi servu al ili en la vivo, por ke ili havu ankoraŭ unu specialigon kiel instruistoj, por ke ili vojaĝu kaj trovu novajn amikojn ne nur en Bulgario. Sed nia sukceso estos des pli granda, se ili ekamos Esperanton pro ĝia belsoneco kaj antaŭ ĉio — pro la nobla ideo, al kiu ĝi servas — la ideo pri interpopola amikeco kaj paco.

Maria JANKOVA

POR PLI AKTIVA KAJ PLI INTERESA SOCIETA VIVO

E-societo „Trifon Hristovski“ en Botevgrad estas unu el la plej junaj enlandaj societoj — ĝi estas fondita antaŭ malpli ol du jaroj. Sed ĝia juneco ne estas nura kronologia fakto — en la societo membras pli ol 40 personoj, el kiuj la plimulto ankoraŭ ne atingis mezagon...

Vere, du jaroj ne estas longa periodo, sed dum tiu tempo la botevgradaj esperantistoj manifestis

AKTIVAN PARTOPRENON

en la socipolitika vivo de la urbo. Antaŭ ol renkonti iun el ili, hazarde mi trafis korespondadon, aperintan en la loka ĵurnalo „Botevgradski Plamak“. Ĝi informis pri la pasintjara partopreno de botevgradanoj en la E-Recitalo de Botev-Poezio en Vraca. Distingiĝis Mariana Nikolova kaj Julia Pavlova, kaj Stamenka Dimitrova estis honorita per diplomo kaj per la speciala premio de la konkurso. Lokaj esperantistoj partoprenis ankaŭ en la Scienc-Praktika E-konferenco en Sumen kaj Preslav honore al la 1300-jara jubileo de Bulgario kune kun siaj kolegoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Sovet-Unio kaj Bulgario.

— Niaj kontaktoj kun en- kaj eksterlandaj esperantistoj komenciĝis tuj post la fondo de la societo — diris la vicprezidanto Vanko Bardarov. — Nia Sofia distrikto estas ĝemela kun Peŝta regiono (Hungario). Inter ili ekzistas ankaŭ kontrakto pri E-kunlaborado. Laŭ tiu ĉi kontrakto kelkaj societaj membroj pasintjare partoprenis en internacia junulara E-laborbrigado en Seksard (Hungario), kie ni ne nur praktikis la lingvon, sed ankaŭ montris nian laborkapablon en... la agrikulturo. Poste niaj reprezentantoj ĉeestis la E-skolon en urbo Eger. La kunlaboro estis tre utila, ni akiris spertojn, kiuj estas aplikblaj ĉe niaj kondiĉoj. Ni ne neglektis la enlandajn E-arangojn. Niaj membroj ĉeestis

la E-renkontigojn en Samokov kaj Blagoevgrad, aktive partoprenis la Nacian Revuon de la E-Parolo kaj Kanto en Pazarĝik. Antaŭ nelonge ni estis inter la partoprenantoj en la turista marŝo omaĝe al la Zamenhofa datreveno. En Botevgrad oni renkontis kun intereso iujn niajn iniciatojn — precipe la E-vesperojn en la Klubejo de Kulturagantoj. Kune ni vizitis la domon de nia patrono Trifon Hristovski. Estas pridiskutota lia libro „Mia vivo“, kiun tradukis en Esperanton Nikola Aleksiev. Ni preparas ankaŭ recitalon omaĝe al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov kaj la 75-jariĝo de BEA.

Estas notinde, ke en Botevgrad oni montras apartan

INTERESON AL LA E-KURSOJ

En la pasinta jaro okazis du kursoj por komencantoj kaj unu — por progresintoj. Diplomiĝis 28 personoj kun bonega rezulto. Nun lernas Esperanton 17 mezlernejoj el la Teknikumo pri Mekanoelektrotekniko „Hristo Botev“. E-kurson partoprenas ankaŭ grupo da junpioniroj en la najbara vilaĝo Skravena. Grandan helpon tiudirekte donas la komunuma kemsomola organizaĵo.

— Ni strebas varbi diversajn homojn de ĉiuj socitavoloj — dividis Stamenka Dimitrova, sekretario de la societo. — Estas ĝojige, ke intereson al la lingvo manifestas gelaboristoj kaj aparte gejunuloj, kiuj estas riĉa rezervo. Ni kuraĝigas ilin korespondi kun eksterlandaj samideanoj kaj interesiĝi pri la E-vivo. La E-periodaĵoj „Bulgara Esperantisto“, „Heroldo de Esperanto“ kaj „Budapeŝta Informilo“ estas bonaj informfontoj. Nun Esperanto estas instruata fakultative en la teknikumo „Hristo Botev“ kaj en la sekva lernejo ni decidis malfermi E-kursojn en la ceteraj urbaj mezlernejoj. Tamen mankas

spertaj kursgvidantoj. Nun instruas nur mi, Slavka Stojanova kaj Vanko Bardarov. Antaŭ nelonge la televido elsendis emision pri la Internacia Lingvo. Estas televidaj kursoj de rusa, angla, franca kaj germana lingvoj. Kial do ne estu ankaŭ E-kurso?

KIAMANIERE RETENI ILIN?

La societo havas stabilan kernon el aktivaĵoj esperantistoj kiel Liljana Petrunova, Vasil Nikolov, Gergana Bocova, Todorka Gančeva. Tamen aperas problemoj kiamaniere retenigi la membrojn en la societo. Kompare kun la pasinta jaro rimarkigas eta regreso. Kial? Ĝis antaŭ nelonge la societo ne havis kun-

venejon. Nun oni jam disponas pri ejo, apartenanta al la Patrolanda Fronto. La avantaĝoj estas sendubaj.

Alia kaŭzo estas la manko de sufiĉaj financaj rimedoj. La esperantistoj mem pagas la kostojn por partopreno en diversaj enlandaj E-arangoj. Tiurilate la Distrikta Estraro de BEA strebas helpi.

Oni devas serĉi interesajn formojn kaj rimedojn por fari la societan vivon pli vigla, pli interesa kaj riĉa je iniciatoj. La membroj de la societo mem devas sencigi la liberan tempon ekster la uzino, entrepreno, lernejo. Rezulte la nombro de la membroj kaj aktivaĵoj konsiderinde kreskos.

Asen BOJAĜIEV

XV KONSULTIĜO DE E-ASOCIOJ EL LA SOCIALISMAJ LANDOJ

De 24-a ĝis 28-a de aprilo en urbo Erevan — Armena Sovetia Socialisma Respubliko (Sovetunio) okazis la XV Konsultiĝo de Reprezentantoj de E-asocioj el la Socialismaj Landoj. En ĝi partoprenis ankaŭ reprezentantoj de fora heroo Vjetnamio. La Konsultiĝo estas ĉiujara tradicia forumo, en kiu oni pridiskutas diversajn problemojn en la evoluo de la E-movado en socialismaj landoj.

La XV Konsultiĝo traktis gravajn problemojn de la socialismaj E-asocioj en la nuna etapo. Inter ili speciale altiris la atenton la problemoj pri aktivado de la esperantistoj por stabiligo de la paco kaj interpopola amikeco — tre necesaj kaj utila laboro ĉe la nuntempa streĉa internacia situacio. Estis emfazite, ke en la kondiĉoj de plua vetarmado ĉiuj esperantistoj devas unuiĝi kaj fari ĉion eblan por savo de la homaro el atomkatastrofo. La partoprenantoj en la Konsultiĝo ankaŭ pridiskutis la problemojn de scienca agado por kaj per Esperanto, kio povus grave kontribui por la evoluo de la E-movado. Ili konsideris la plivastigon de tiu ĉi agado ege necesaj kaj utila. Krom tio oni priparolis organizajn kaj instrumentajn por preparado de E-aktivuloj en la socialismaj landoj. Tiucele oni devus profiti la favorajn kondiĉojn de la Internacia E-Kursejo en Bulgario kiel internacia centro por kvalifikado de E-aktivuloj.

La infanoj-esperantistoj estas la estonteco de la E-movado. Grava tasko de la gvidan-

taroj de E-asocioj en la socialismaj landoj estas prizorgi ilian instruadon. La infanaj E-renkontiĝoj estus utilaj por lingva perfektigo kaj reciproka interkonatiĝo. La iniciato de BEA pri partopreno de infanoj-esperantistoj el la tuta mondo en la II Internacia Infana Asembleo „Standardo de la Paco“ estis afable aprobita de la koncernaj instancoj en nia lando. La partoprenantoj en la Konsultiĝo unuanime subtenis tiun ĉi iniciaton, kiu praktike pruvos la utilon kaj la avantaĝojn de la Internacia Lingvo. Ili deklaris sian pretecon kunlabori por ĝia realigo. Okazis ankaŭ interŝanĝo de spertoj pri la agado de la landaj E-asocioj en diversaj sferoj de la vivo.

Ci-jare la progresema homaro celebros la 60-jaran jubileon de Sovetunio. La partoprenantoj en la Konsultiĝo speciale pridiskutis la antaŭstarantan festadon de tiu datreveno fare de esperantistoj el la socialismaj landoj kaj informis pri iuj jam realigitaj iniciatoj tiurilate.

La dommastroj — la estraro de armena filio de la Unuiĝo de Sovetiaj Societoj de Amikeco (SSOD), la estraro de ASE kaj la filio de ASE en Armena SSR faris modelan organizon kaj disponigis bonegajn laborkondiĉojn por la okazigo de la konsultiĝo, pro kio meritis la profundan dankon de ĉiuj partoprenantoj.

Dimitar PAPAŬOV

POEZIA „SIRINGA VESPERO“ EN LOVEĈ



D-ro Tjuran Omer, direktanto de la programo kaj Ljudmila — la plej juna esperantistino en Loveĉ

LA „SIRINGA VESPERO“

La 24-an kaj 25-an de aprilo ĉi-jare la bela urbo Loveĉ, fama per sia siringa parko, estis gastiganto de la Dua „Siringa Vespero-82“, en kies kadro okazis Konkurso-Recitalo de Originala kaj Traduka E-poezio.

La „Siringa Vespero-82“ estis saturita de amikemo kaj bonhumoro. Ĝi estis amase vizitata — partoprenis ĉirkaŭ 100 personoj el pli ol 20 urboj, el ili 10 distriktaj urboj.

La afablaj dommastroj sukcesis krei tre agrablan festan etoson. En la bela kaj vasta halo de la Junulara Domo ĉiu el la gastoj havis sian lokon. Ludis orkestro kaj estis dancoj, multaj dancoj! ... En la ripozoj inter la dancoj oni ĝuis bonan amuzan programon el kantoj kaj deklamadoj, kies plenumantoj estis kaj dommastroj, kaj gastoj.

La amuza vespero finiĝis post noktomezo.

La sekvan tagon matene estis organizita promenado, dum kiu la partoprenantoj en la Siringa Festo ĝuis la rimarkindaĵojn de Loveĉ — la arkitekturan-historian rezervejon „Varoša“, kaj la Siringan parkon „Strateš“. Tamen, por granda bedaŭro de la dommastroj, la siringoj en la siringa parko ĉiam ankoraŭ ne floris pro la malvarma vetero! ...

LA KUNSIDO POR INTER-SANGO DE SPERTOJ

En la kadro de la gaja Siringa Festo en Loveĉ okazis ankaŭ tre serioza interparolo — la ĉeestantoj pridiskutis gravan organizon problemon — la problemon pri altiro kaj reteno de novaj adeptoj al la E-movado. En amika atmosfero, tute nature, oni faris tre interesajn kaj valorajn eldirojn. La parolon prenis d-rino Tjuran Omer (Loveĉ), Neli Abaĝieva (Sofio), Violin Oljanov (Sofio) kaj multaj aliaj.

El ĉio dirita oni povas fari jenajn konkludojn:

— Plej grava kondiĉo por reteni la novajn esperantistojn, por konvinki ilin, ke Esperanto estas serioza afero kaj ne hobiaĵo de stranguloj estas la bona, eĉ komforta E-klubo, kie oni povus labori, amuziĝi kaj ripozi en kultura medio — ja oni adiaŭas laŭ la saĝo, sed tamen, bedaŭrinde, bonvenigas laŭ la veso — la moderna homo, por povi serioze akcepti iun ideon kaj okupiĝi pri ĝi agado, devas disponi pri la necesaj konvenaj kondiĉoj. ...

— Tre ofte la novajn esperantistojn repuŝas la konstato, ke en la E-medioj oni fuŝe parolas aŭ tute ne parolas Esperanton.

Do — du gravaj konkludoj! Por altiri novajn homojn, oni devas proponi al ili almenaŭ normalajn, se ne agrablajn kondiĉojn por laboro kaj pruvi, ke esperantistoj estas precipe tiuj, kiuj scipovas paroli kaj aplikati la Internacian Lingvon.

LA KONKURSO-RECITALO

La plej grava programero de la „Siringa Vespero-82“, per kiu ĝi fakte komenciĝis, estis la Konkurso-Recitalo de Originala kaj Traduka E-Poezio.

La ĵurnalisto Coĉo Kolarov, vic-prezidanto de la E-societo en Loveĉ, varme salutis la gastojn kaj donis la parolon al Violin Oljanov — reprezentanto de BEA kaj prezidanto de la konkursa jurio, kiu konigis al la ĉeestantoj la kondiĉojn por partopreno en la konkurso kaj informis ilin, ke por la konkurso estis prezentitaj 25 verkoj — nur originale verkitaj versaĵoj. Tradukadoj ne estis prezentitaj. Multaj el la versaĵoj, laŭ la vortoj de Oljanov, estis tre bonaj. „Do, la celo de la konkurso — krei E-poetojn — estas atingita“ — li konkludis.

La jurio objektive pritaksis la verkojn laŭ ilia valoro — tema, idea kaj belarta. Estis difinitaj I, II kaj III premioj kaj unu kuraĝiga premio — por verko sufiĉe valora laŭ siaj kvalitoj, kiu tamen ne rajtis konkuri por la unuaj tri lokoj, ĉar ĝia aŭtoro malob-servis la regulojn de la konkurso.

La venkintoj deklamis siajn versaĵojn kaj oni solene enmanigis al ili la premiojn — kristalajn vazojn.

Kaj tamen la konkurso pasis iom „interalie“ en la kadro de la gaja „Siringa Vespero“.

Simila konkurso estus efektive tre utila, se oni apartigus al ĝi pli da tempo; se krom la raporto de la jurio, traktanta la atingojn kaj la malperfektaĵojn de la prezentitaj verkoj ĝenerale, estus organizita recitado ne

nur de la premiitaj, sed ankaŭ de aliaj konkursaĵoj, akompanata de konciza, sed sperta komentario al ĉiu el ili; se en la kadro de la konkurso oni povus aŭdi kelkajn bonajn prelegojn pri la arto verki kaj traduki poeziaĵojn, ktp.

Ni esperu, ke la organizantoj de la Konkurso-Recitalo de Originala kaj Traduka E-Poezio estonte agos por transformi ĝin en siaspecan forĝejon de literaturaj kadroj por la E-movado en Bulgario, ĉar la movado estos forta, se ĝi havos siajn spertajn poetojn, verkistojn, tradukistojn — ĝenerale homojn, kiuj bone posedas kaj majstre aplikas la Internacian Lingvon.

Lidia RAEVA

LISTO DE LA PREMIITOJ

EN LA KONKURSO DE ORIGINALA KAJ TRADUKA E-POEZIO, LOVEĈ, APRILO 1982

I premio — **DANĈO DANĈEV** el Plovdiv — por la versaĵo „Senmorteco“.

II premio — **STAMENKA DIMITROVA** el Botevgrad — por la versaĵo „Konfesoj“.

III premio — **PENKA PAPAZOVA** el Jambol — por la versaĵo „Ne diru al mi“.

Kuragiga premio — **IVAN GEORGIEV** el Sevlievo — por la versaĵo „Ludo“.

KONSISTO DE LA JURIO

Prezidanto: **VIOLIN OLJANOV**

Membroj: **KUNĈO VALEV**
COĈO KOLAROV

SENMORTECO

(Gajninta I premion en la konkurso)

Kuŝas sub la herbo verda
de deziro plena kor',
kor' heroa kaj senperda,
ĉiam de la morto for.

Kreskas el ĝi ĉarma floro
sur herbejoj kaj arbar'
kaj disfluas bonodoro
de montetoj kaj kampar'.

Sango ĝia en la fonto
pura ŝprucas kaj river'
ekkomencas de la monto
je la homa sankta ver'.

Kuŝas sub la herbo verda
disfrita juna kor',
kor' heroa kaj senperda —
ĉiam de la morto for . . .

DANĈO DANĈEV,
Plovdiv

ĜOJIGA SUKCESO

Konsiderante la pozitivajn rezultojn de Esperanto-Instruado kaj edukado en la lernejoj la Ministerio de Popola Klerigo enkondukas ekde la nova lernejararo 1982—1983 fakultativan instruadon de Esperanto ankaŭ en la X klasojn de ĉiuj mezlernejoj.

La bulgaraj esperantistoj kore dankas al la superaj ŝtataj klerigaj instancoj pro la manifestita kompreno de la grava rolo de Esperanto-instruado en la lernejoj por plialtigo de la lingva kaj ĝenerala kulturo de la gelernantoj, el kies vicoj en la bulgarian E-movadon venos novaj generacioj de esperantistoj.

La enkonduko de fakultativa lernado de Esperanto en la X klasojn de la mezlernejoj estas nova grava akiraĵo por la bulgara E-Movado. Ĝi kontribuos por plifirmigo de la lingvosciigo, akiritaj en la IX klaso, kaj antaŭenpuŝos la disvastigon de la Internacia Lingvo en nia lando.

PARE' 82

La Distrikta Junulara Domo en urbo Ruse ankaŭ ĉi-jare gastame malfermis siajn pordojn por akcepti la partoprenantojn en la jam tradicia Printempa Amika Renkontiĝo de Esperantistoj (PARE'82). Ĝi estis dediĉita al la 100-jara jubileo de la granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov.

Ce la solena inaŭguro la E-veterano Stefan Popov interese kaj emocie parolis pri la vivo kaj la kontribuo de G. Dimitrov al la monda revolucia movado.

Kune kun 173 partoprenantoj el 20 urboj kaj vilaĝoj de la lando karaj gastoj estis ankaŭ Hanna Sefs kaj Detlev Sol — delegitoj el Potsdam — gemela urbo de Ruse.

Dum la literatura-muzika programo agrablan impreson faris la danco „Alen mak“ („Ruĝa papavo“), plenumita de Jonka Petkova — unua baletistino de la Operteatro en Ruse kaj la recitalo „La leteroj de Ljuba Ivoŝeviĉ al Georgi Dimitrov“.

Boris Kavalĝiev

JUNULARA RENKONTIĜO

En la kadro de PARE'82 en urbo Ruse okazis renkontiĝo-interparolo de gejunuloj-esperantistoj el Norda Bulgario.

La temo de la raporto — „La aktivado de la junaj esperantistoj el Ruse en la Distrikta Junulara Domo“ provokis viglan intereson. En siaj eldiroj la gastoj el GDR Hanna Sefs kaj Detlev Sol substrekiis, ke la E-junularo el Ruse havas interesan sperton en la organiza aktivado. Ili esprimis deziron plifortigi la kontaktojn inter la junuloj-esperantistoj el Ruse kaj Potsdam.



Dum la diskutoj sian sperton dividis la junaj esperantistoj el Dve Mogili, Trojan, Dimitrovgrad, Veliko Tarnovo k. a. kaj ankaŭ pli spertaj aktivul j — Cočo Kolarov (Loveĉ), Bojĉo Mladenov (Vraca), Nejko Nejkov (Dve Mogili), Kosta Penev (Sofio) k. a.

La organizo de similaj ĉiujaraj distriktaj kaj naciaj renkontiĝoj devas estiĝi tradicio. Tiamaniere la junaj esperantistoj havus la eblecon ne nur interkonatiĝi, sed ankaŭ organizi komunajn aranĝojn kaj pliriĉigi sian lingvan kulturon.

Binka Ŝiškova

DISTRIKTA E-KONFERENCO

La 18-an de aprilo en Veliko Tarnovo okazis Distrikta E-konferenco, kiun partoprenis delegitoj de E-societoj el Veliko Tarnovo, G. Orjahovica, Polski Trambes, Pavlikeni, Sviŝtov, Elena kaj v. Daskot. Gastoj de la konferenco estis Kunĉo Valev — ĝenerala sekretario de BEA kaj prof. Angel Davidov — rektoro de la Universitato en Veliko Tarnovo. Vigla diskutado postsekvis la raporton de DK de BEA. Eldirojn faris 15 delegitoj kaj Kunĉo Valev, ĝenerala sekretario de BEA. Unuanime estis substrekiita la neceso de kunordigita agado de niaj E-societoj, samkiel la akra bezono de E-instruistoj por niaj lernejoj, kie oni rajtas instrui fakultative Esperanton. La Distrikta E-konferenco akceptis pavalvokon.

Olga Cankova

VALORA ELDONAĜO

Laŭ propono de la Komisiono pri Esperanto ĉe la Centra Konsilantaro de la Asocio de Blinduloj en Bulgario ĉi-jare estas eldonitaj brajle (en la alfabeto de la blinduloj) „Elektitaj Versaĵoj“ de N.J. Vapcarov. Tiu ĉi valora E-eldonaĵo estas la unua en Bulgario kaj estas dediĉita al la 40-a datreveno de la heroo pere de la mondfama poeto-komunisto kaj antifaŝisto.

La Komisiono decidis dissendi la libron al ĉiuj grandaj bibliotekoj por blinduloj en la mondo. La bulgaraj blindaj esperantistoj sendos ekzemplerojn de „Elektitaj Versaĵoj“ al siaj eksterlandaj korespondantoj. Oni donacos ĉi tiun eldonajojn al la Domo-Muzeo de Vapcarov en urbo Bansko dum la tagoj de Vapcarov-festivalo en oktobro j.k.

Vladimir Jelev

KUN NOVAJ FORTOJ

Jam kvar monatojn en Plovdiv aktivis la restarigita medicinista grupo ĉe DE de BEA, fondita en februaro 1961. Ĝi nombras nun 49 membrojn — kuraĉistoj, stomatologoj, flegistinoj, akuŝistinoj kaj aliaj specialistoj en la sfero de sanprotektado. En la estraro de la grupo estis elektitaj: prof. P. Pejĉev — prezidanto, d-ino T. Hubenova — vicprezidanto, E. Jovĉeva — sekretario kaj membroj: d-ino E. Aristozova kaj P. Bojaĝieva.

Post la nacia konferenco en Sofio je la 6-a de februaro ĉi-jare la grupo preparis sian laborplanon konforme al la ĉefaj taskoj, starantaj antaŭ la medicinistoj-esperantistoj en Bulgario dum la jubileo por BEA kaj por ĝia medicinista sekcio jaro. La plovdivaj medicinistoj konstante laboras por pliatigo de la lingva nivelo; por disvastigo de Esperanto inter samfakuloj, precipe per organizado de E-kursoj; por starigo de kontaktoj kun similaj grupoj en Bulgario kaj en eksterlando, precipe en la ĝemelurboj de Plovdiv. Estas starigitaj specialaj taskoj lige kun la jubileo de BEA.

La grupo funkcias kiel Klubo de Esperantistoj ĉe la Kulturdomo de Medicinistoj en Plovdiv. La medicinista grupo okazigas ĉiunonatajn kunvenojn laŭ anticipe preparita programo, antaŭvidanta prezenton de medicinaj informoj, referaĵoj kaj traktadon de lingvaj problemoj. Inter la regulaj kunvenoj la esperantistoj-medicinistoj disponas pri favoraj kondiĉoj en la Kulturdomo por distro, kontaktoj kaj renkontiĝoj.

T. Hubenova

BULGARA POETO PENĈO SLAVEJKOV

(1866—1912)



Pasis jam 70 jaroj de post la morto de la fama bulgara poeto Penĉo Slavejkov — filo de unu el la fondintoj de la moderna bulgara poezio Petko R. Slavejkov, elstara patrioto-demokrato. Post la gimnazia klereco la juna Slavejkov studis en Germanio literaturon en la universitato de Lejpcigo. En Bulgario li longajn jarojn okupis kulturajn postenojn, sed grandan pozitivan heredaĵon li postlasis precipe kiel direktoro de la Bulgara Nacia Teatro. Krom la fame konata bulgara nacia verkisto Ivan Vazov (kies populara romano „Sub la jugo“ estas eldonita en Esperanto) plej elstara figuro en la tiutempa bulgara poezio estis Penĉo Slavejkov.

Li publikigis intimajn versaĵojn, poemojn laŭ folkloraj motivoj kaj grandajn poeziajn verkojn, el kiuj plej konata estas lia „Sanga kanto“, kies enhavo estas ĉerpita el la naci-liberiga batalo de la bulgara popolo en la lasta kvarono de la XIX jarcento kontraŭ la 500-jara sklavregimo de la turkaj feŭdaloj kaj sultanoj.

Multaj versaĵoj de Slavejkov fariĝis popularaj popolkantoj, kiel ekzemple „Dum la juneco“, „Nedisigeblaj“ k. a.

En Esperanto estas tradukitaj kelkaj el ili. En „Bulgara Antologio“ antaŭ kvardek jaroj aperis lia tradukita en Esperanto poemo „Nedisigeblaj“ — belega poezia prikanto de

la fortega junula amo. Unu el la pioniroj de la esperantista movado en Bulgario, la jam forpasinta kolonelo Silvestriev, laboris longajn jarojn kaj preparis zorgeme faritan tradukon de la ĉefverko de Slavejkov — „Sanga kanto“, bedaŭrinde ankoraŭ ne eldonita.

En la kultura kaj socia vivo de sia patrulando Slavejkov agis plejparte el progresemaĵ kaj demokratecaj pozicioj, kiuj estas alte taksataj de la novaj generacioj.

Li faris multajn tradukojn de verkoj de Heine kaj de aliaj germanaj poetoj. Slavejkov treege ŝatis la verkaron de Puŝkin, Gogol, Tolstoj pro la entenata en ĝi „humanismo“, komprenemo kaj kunsentemo al la ĝojoj kaj suferoj de la homoj.

Siatempe la konata germana tradukisto kaj literaturisto Georg Adam kaj la ne malpli konata sveda sciencisto-filologo Alfred Jensen proponis al la Nobel-komitato aljuĝi al Slavejkov la premion por literaturo. La akademia komisiono en Stokholmo donis pozitivan opinion pri tiu propono, sed la poeto subite mortis kaj la Nobel-komitato ne estis decida pova en simila okazo.

Eksciinte pri la morto de Slavejkov la fama rusa verkisto Maksim Gorki tuj sendis telegramon, en kiu li deklaris, ke „partoprenas la malĝojon de la bulgara popolo“ kaj finas per la vortoj: „La poeto estas koro de la popolo. Li estas senmorta.“

N. ALEKSIEV

DUM LA JUNEKO

Penĉo Slavejkov

Dum la junec' radias sun' el or',
en oraj revoj lulas' sin la kor'.

Dum juna aĝo estas voj' senpena —
facile la vivbatojn ni eltenas.

Juneco estas ŝerco, rid', festen',
ne ombras koron tiam la ĉagren'.
Malĝoj' eĉ fonto estas de gajeco —
dum juna aĝo, ah, dum la juneco!

Tradukis: Simeon M. Simeonov

Dum multaj jaroj mi kolektis materialon pri A. Zilbernik (1831—1906), bopatro de la kreinto de Esperanto L. Zamenhof. A. Zilbernik estis unua mecenato de Esperanto. Sen li Esperanto hodiaŭ ne ekzistus en la mondo. Nun mi kolektas materialon pri la 4 filoj kaj 5 filinoj de A. Zilbernik.

La plej aĝa filo de A. Zilbernik estis Josef. Li naskiĝis en 1850 en Kovno, Rusujo. Kiam li estis en la lastaj klasoj de la gimnazio en Kovno, li aliĝis al la eksterlega popola movado por disvastigi kleracon inter malriĉaj klasoj. En subtegmenta etaĝo de la patra domo li kolektis junulojn por instrui ilin en diversaj fakoj. Kiam li fariĝis studento de la Tehnologa Altlernejo en S. Peterburg, Rusujo, li daŭrigis dum la libertempoj la instruadon de gejunuloj en sia subtegmenta ĉambreto. La cara politika polico eksciis pri tio kaj avertis lian patron, ke Josef devas forlasi Rusujon, alie li estos forsendita en Siberion.

En 1872 J. Zilbernik elmigris en Usonon kaj fariĝis instruisto en la hebrea lernejo por rifuĝintoj. Poste li fariĝis tradukisto de la lingvoj hebrea, germana, rusa. En la sama tempo li komencis favoran laboron por disvastigi Esperanton. Ĝis sia morto li estis ĉefa delegito de Universala Esperanto-Asocio en New York.

Li forlasis Usonon nur unu fojon en julio 1913 por partopreni Universalan Kongreson de Esperanto en Praha, Ĉeĥoslovakio, kie li renkontiĝis kun d-ro L. Zamenhof. J. Zilbernik ĝis sia morto restis fraŭlo. Li neniam zorgis pri si mem kaj vivis en tiaj cirkonstancoj, kiujn oni povas nomi preskaŭ mizeraj. Li mortis la 30. 8. 1925, 75-jaraĝa, en New York, Usono. La surskribo sur lia tomboŝtono estas en Esperanto:

Tie ĉi ripozas

JOSEPH ZILBERNIK

mortis Aŭg. 30-an 1925, 75-jara

Dormu pace kara amiko

ESPERANTO kaj

UEA progresas.

Alia filo de A. Zilbernik estis S. Zilbernik, kiu loĝis en Kovno, Rusujo. Li esperantiĝis en 1891. En Adresaro de la esperantistoj, 1892, serio 2, lia numero estas 1438.

Alia filo de A. Zilbernik estis M. A. Zilbernik. Li estis farmaciisto en Kremenčug, en gubernio de Poltava, Rusujo. Li esperantiĝis en 1896. En la adresaro de esperantistoj, 1897, serio 17, lia numero estas 3719.

Por la kvara filo de A. Zilbernik mankas informoj.

La plej aĝa filino de A. Zilbernik estis Rozoljo. Ŝi naskiĝis en 1852, estis edzino de Jozef Levite, riĉa grandkomercisto de teksa-

joj en Varsovio. Filo de geedzoj Levite estis Maks. Li naskiĝis en 1881. Li edziĝis la 1-an de decembro 1908 en Vilno, Rusujo. Post edziĝo li translokiĝis Palestinon, kie li laboris kiel agronomo. Li esperantiĝis en 1901. En la Adresaro de la esperantistoj, 1902, serio 22, lia numero estas 5922.

Alia filino de A. Zilbernik estis Tereza. Ŝi naskiĝis la 14-an (la 26-an laŭ nova kalendarstilo) de oktobro 1862 kaj estis edzino de kuracisto J. Kotzin en Kovno, Rusujo. Li mortis 17-an de majo 1929, 72-jara, en Kaunas, Litovujo. S-ino Kotzin en 1933 en Kaunas, Litovujo, havis apotekon. Filo de geedzoj Kotzin estis Boris. Li naskiĝis en 1887 en Kovno, Rusujo. Esperantisto de 1902. En la Adresaro de la esperantistoj, 1903, serio 23, lia numero estas 6753. Li kunlaboris en Lingvo Internacia kaj aliaj esperantaj gazetoj, tradukis multajn verkojn de Ĉeĥov, Gorkij k. a. En 1910—1915 Kotzin redaktis gazeton „La Ondo de Esperanto“. En 1911—1913 estis vicprezidanto de Moskva Societo Esperantista. Kotzin verkis la plej kompletan kritikon de Ido „Historio kaj teorio de Ido“, 1913. En 1920 Kotzin enkondukis Esperanton en Sovetan sindikaton de artistoj kaj en ties organo „Rabis“. Li mortis la 5-an de aŭgusto 1958 en Moskvo, Sovetunio.

Du filinoj de A. Zilbernik (antaŭnomoj ne estas konataj) estis edzinoj de du fratoj, farmaciistoj Ivenski.

La plej juna filino de A. Zilbernik estis Klara (6 okt. 1863—6 dec. 1924). Ŝi fianĉiĝis kun L. Zamenhof la 30-an de marto 1887, edziniĝis kun Zamenhof la 9-an de aŭgusto 1887. Ŝi senhezite fordonis sian tutan doton al la edzo por la eldono de la unuaj broŝuroj de Esperanto en 1887. Ŝi estis ĉiama kunlaborantino kaj helpantino de la edzo, ofte plenumis liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn. Ankaŭ post la morto de Zamenhof aktive partoprenis la movadon. Dank' al ŝia kunhelpo fondiĝis la Esperanto-Rondo „Konkordo“ en Varsovio. Ŝi ĉeestis ĉiujn universaliajn kongresojn de Esperanto inkluzive la Vianan en 1924, kiu estis ŝia lasta renkontiĝo kun la esperantistoj.

Mi ne sukcesis doni plenan bildon de la 9 gefiloj de A. Zilbernik.

Mi volonte kaj danke akceptus pluajn kontribuojn, se estos trovitaj kaj senditaj al mia adreso:

Adolf Holzhaus

2748 Orchard Lane

Columbus, Indiana

USA 47201



Aleksandro Zilbernik, bopatro de L. Zamenhof, la unua mecenato de Esperanto kaj fervora esperantisto, posedis ne grandan domon en urbo Kovno (nun Kaunas), Litova SSR. En tiu domo logis la familio de A. Zilbernik kaj lia filino Klara, estonta edzino de L. Zamenhof. Li mem ofte venis, gastis kaj eĉ kelkan tempon ĉi tie logis. Li amis Litovionkiel sian patron.

Kaunasaj geesperantistoj klopodas ricevi permeson, post rekonstruo, marki la domon per memortabulo, kiu montros, ke ĝi apartenis al la unua mecenato de Esperanto A. Zilbernik kaj ke ĉi tie ofte estadis L. Zamenhof.

Estus bone, se en la domo estus apartigita kvankam unu ĉambro por Esperanta muzeo.

La domo estas tre grava kaj kara objekto por la kaunasaj esperantistoj.

Pranas SITONIS.
Litova SSR

Sur la foto: La domo de A. Zilbernik en Kaunas.

INFANOJ PROFUNDE SENTAS LA LINGVON

— Onjo, ĉu Esperanto estas urbo? . . .
njo, ĉu Esperanto estas rusa lingvo? . . .
Kaj kie estas la oĉjo, kiu elpensis tiun ĉi lingvon? . . .

. . . Tiel komenciĝis ilia konatiĝo kun la Internacia Lingvo. Mi provis klarigi al ili kio estas Esperanto en maniero plej klara por ilia infana konscio. Mi diris al ili:

— Tiu ĉi lingvo, infanetoj, estas lingvo de ĉiuj popoloj. . . Ĝi servas al la homoj por ami unu la alian, por ke la infanoj en la tuta mondo vivu en paco. . .

Tre facile mi laboras kun tiuj etuloj — 15 geknabetoj el la infangardeno „Ĉervena Zvezda“ („Ruĝa Stelo“). Ili rapide komprenas kaj penas klare prononci ĉiun sonon. . . La infanoj posedas profundan senton pri la lingvo. Oni aŭskultis ilin ĉe la solena inaŭguro de la XV Nacia Revuo de E-Kanto kaj Parolo. Ĉiu el ili ellernis parkere ne nur sian versaĵon, sed ankaŭ la versaĵojn de siaj

kamaradoj. Kiam la infanetoj vidas min, ili al-kuras, ili senpacience atendas la komencon de la leciono. Ni ĉion lernas helpe de akordiono kaj ni ĉiam disponas pri salono por niaj okupoj kaj ludoj. La laborkondiĉoj tie ĉi estas bonegaj. . . Fakte, unue mi komencis instrui Esperanton al la instruistinoj kaj al la flegistinoj. Poste ĉeestis kelkajn solenaĵojn, en kiuj per kantoj kaj versaĵoj partoprenis iliaj edukitoj. La infanetoj plaĉis al mi kaj mi decidis apliki miajn profesiajn spertojn por instrui al ili Esperanton. Mia opinio la eksperimento sukcesis. En tiu infangardeno estas bona bazo por aplikado de nova metodiko — speciale por infanoj. Tiu infandomo povas ludi rolon de iuspeca infana skolo por instruado de Esperanto.

Stefka ĈENKOVA,
instruistino de Esperanto,
Pleven

KIOM DA SIGNIFOJ HAVAS „DISKOTEKO“ EN ESPERANTO?

Komparu jenajn frazojn ĉerpitajn el nuntempaj Esperanto-periodaĵoj:

1. „Diskoteko en Istanbul donis tre aktualajn premiojn al la unuaj du venkintoj en danckonkurso.“
2. „El la oftaj postvesperaj kulturprogramoj (diskoteko, diafilmo-projekciado, fungoekspozicio) elstaris la kulturvespero.“
3. „Kiu povas helpi riĉigi mian formiĝantan mondampleksan diskotekon, skribu al . . .“
4. „Kiam ekpensos mi post jaroj . . . pri l'varma hejmo kaj diskoteko“ . . .“

La verkintoj de tiuj frazoj verŝajne supozas, ke la vorto „diskoteko“ estas sufiĉe internacia laŭforme kaj laŭsignife por esti tuj komprenebla. Tamen, se oni konsultas **Plenan Ilustritan Vortaron** (PIV), la plej kompletan E-vortaron, eldonitan en 1970, oni trovas, ke ĝia unulinia difino ne estas adekvata. Sub la artikol-vorto „disko“ estas registrita la kunmetaĵo „diskoteko“: „klasigilo kaj tenujo por gramofonaj diskoj“. Tiu difino baziĝas sur jena analizo: „diskoteko“ = „disko“ + „teko“. „Teko“ laŭ la kvara difino en PIV estas „kolekto kaj kolektaĵo de dokumentoj“. Ekzemploj de tiu-specia teko estas „kartoteko“, „mapoteko“ kaj „librotoko“. Ĉi-lastaj vortoj signifas la samon kiel „biblioteko“, kiu ne estas kunmetita vorto en Esperanto.

Cu tiu difino taŭgas en la kuntekstoj de la kvar ekzemplofrazoj? Tute ne! Oni ne simple kunmetas kolekton da diskoj aŭ vizitas lokon, kie troviĝas tia kolekto. Aliaj E-vortaroj registras „diskoteko“, sed neniu donas kompletan difinon. La anglalingva vortaro de M. C. Butler (1867) difinas ĝin kiel „library of gramophone records“ (biblioteko de gramofonaj diskoj), same kiel J. C. Wells faras en sia vortaro (1969): „record library“ (diskobiblioteko). Sed li aldonas ankaŭ, ke ĝi estas la ekvivalento de **discotheque**, kiu en la angla parto de lia vortaro estas tradukita per „diskoklubo“. „Diskoteko“ kaj „diskokolekto“ estas la tradukoj ankaŭ de la sveda **diskotek** en la vortaro de Vilborg (1975). La bulgara vortaro de Atanasov (1961) kaj la franca vortaro de Waringhien (1957) ambaŭ registras „diskoteko“, sed tradukas ĝin per preskaŭ identa etnolingva vorto sen plua difino. Kaj la samon faras Ĝivoje en sia kroatiserba-esperanta vortaro (1966).

En ne-esperantaj vortaroj kaj konsultlibroj oni povas informiĝi pri la historio de la vorto, kiu aperis la unuan fojon en la franca lingvo kiel **discothèque**, formita laŭ la analogio de **bibliothèque**. Ĝi estis uzata por priskribi malgrandan intiman noktoklubon, provizitan per dancmuziko ĉefe en la formo de gramofonaj diskoj. La unuaj tiaj lokaloj estis en Parizo, sed jam en la 1930-aj jaroj ili troviĝis en pluraj aliaj urboj kaj landoj. Poste la vorto ĉesis esti aplikata al kluboj kun nur diske registrita muziko, kaj ĝia semantika enhavo fariĝis pli vasta.

Surbaze de la jam registritaj difinoj de diskoteko, kaj ankaŭ la plivastigo de ĝia „signifo dum la lastaj jaroj, mi proponas jenan kompletan difinon por suplemento de PIV aŭ, eventuale, nova eldono de tiu verko.

DISKOTEKO:

- a. kolekto da gramofonaj diskoj.
 - b. klasigilo, tenujo aŭ speciala meblo por konservi tiun kolekton.
 - c. institucio, kies celo estas kolekti, konservi kaj studi ĉiuspecajn gramofonajn (surdiskajn) registraĵojn; ĝiaj kolektoj povas inkludi ankaŭ fonografajn registraĵojn sur cilindroj kaj eventuale aliajn specojn de sonregistrado (magnetofona).
- a. malgranda intima noktoklubo aŭ simila aranĝo por dancado laŭ diska muziko.
 - b. noktoklubo por dancado laŭ diska kaj orkestra muziko, kie povas funkcii ankaŭ psikedelaj* atrakcioj, multformaj komunikiloj (diapozitivaj, filmoj), specialaj lumefektoj kaj kineta sono.

Helpe de tiuj ĉi difinoj, oni povas kompreni la signifon de la kvar ekzemplofrazoj. La unua temas pri noktoklubo por dancado. Ankaŭ la dua priskribas danc-aranĝojn laŭ diska muziko. En la ceteraj du frazoj la verkintoj priktas sian personan, hejman kolekton de gramofonaj diskoj.

Bernard GOLDEN

* Psikedela — rilata al psikodelismo (ŝtato de maldorma sonĝo, kaŭzata de uzo de halucinogenaj substancoj kiel LSD — vidu PIV, paĝo 1213).

INTERNACIA RENKONTIĜO DE E-TEATROJ

El Hungario ni ricevis detalan materialon kaj belan programfolion pri la sukceso okazinta inter la 19-a kaj 28-a de marto 1982 en Budapeŝto INTERNACIA RENKONTIĜO DE E-TEATROJ. Ĝi konsistis el 12 teatraj prezentadoj de aktoroj el Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetunio. La Renkontiĝon iniciatis kaj financis Hungara Turisma Oficejo konforme al la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo en Manilo (Filipinoj) antaŭ tri jaroj. La aranĝo okazis en la kadro de Budapeŝta Printempa Festivalo.

La solena inaŭguro de la Renkontiĝo okazis la 19-an de marto en la budapeŝta teatro „Miklós Radnóti“. La aktorino Virag Döry laŭtleĝis en Esperanto kaj hungare salutleteron al la Renkontiĝo de Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA. D-ro Imre Pethes, vicprezidanto de HEA, solene inaŭguris la Renkontiĝon. Estis prezentita la teatraĵo „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?“ de János Esem.

Fakte ĝi estis vera premiero, ja la teatraĵo estis verkita en hungara lingvo, tamen ĝi ne aperis ankoraŭ sur hungaraj scenejoj. Oni enscenigas ĝin por unua fojo nun — en Esperanto.

Du aktoroj el Leningrada E-Teatro prezentis koncizigon de la Sekspira „Hamleto“ en formo kuraje eksperimenta kaj impresa.

Jadwiga Gibczynska el Pollando prezentis tre emocie „Slavajn fabelojn“ de B. Leŝmian. La pola aktorino ludis kun granda

Sceno el „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?“ Foto de Z. Fejér.



Sceno el „La aŭtoroj tie ĉi estas silentaj“ de B. Vasilev. Foto de MTI.

sukceso ankaŭ la sekvan vesperon, prezentante premiere sian monodramon „Zamenhof“. Si bildigis por la publiko la luktoplenan vivon de la aŭtoro de Esperanto per la vivo de tri virinoj, tre proksimaj al li: la patrino, edzino kaj filino.

La teatraĵo „La aŭtoroj ĉi-tie estas silentaj“ de la soveta aŭtoro B. Vasilev antaŭ 10 jaroj furoris en multaj teatroj de Eŭropo. Ĝi estis prezentita ĉirkaŭ 300-foje en Hungario. Kaj nun la samaj geaktoroj sub la gvidado de la reĝisoro István Iglódi prezentis en Esperanto tiun spektaklon en du vesperoj.

La „Krizalido“, Teatro Internacia de Akvitanio (Francio) prezentis sin per du teatraĵoj: „Ĉu Dio bojas?“ de Boyer kaj E-premiero de „La Evento“ de la franca dramisto Foissy.

En la Renkontiĝo sin prezentis ankaŭ du amatoraj trupoj: „Garabonciás“ el la hungara urbo Kecskemet kun la teatraĵo „La kastelo de la blubarba princo“ de B. Balasz kaj la teatra trupo „Gorgó“ el Budapeŝto per la erotika komedieto „La naskiĝo de la relikvo“ de Pietro Bambi.

En la lasta tago bonege sin prezentis la internacie konata pupartisto-esperantisto Robert Banky per sia „Pup-cirko“. La lerte aranĝita kaj majstre prezentita programo altiris ĉies atenton, eĉ tiun de komencantoj, ĉar la lingvaĵo estis tre facila. La nur 20-minuta „Li trosalis“ de Ĉeĥov en la plenumo de Oleg Popkov kaj Raŝid Hajrullin (Leningrada E-Teatro) estis majstra prezentado de karakterize rusa humuro al internacia publiko. Kaj la publiko inde pritaksis ĝin.

Ni esperas, ke venontjare bulgaraj aktoroj-esperantistoj ankaŭ partoprenos tiun interesan internacian arangon kaj montras sian majstrecon kaj altnivelan lingvoscion.

VERDAJ STELTOJ

GASTE ĈE DIMITROV JE LA 1-a DE
JANUARO 1947

LA EVENTO. LA KNABINETO SUR LA FOTO REMEMORAS LA NEFORGESEBLAN NOVJARAN FESTON ĈE GEORGI DIMITROV. LA VIVO DE LA FOTO.



Sur la foto: Nuška kaj Dimitrov, la 1-an de januaro 1947.

Tiu ĉi foto estas farita la 1-an de januaro 1947. Tiam la novjara festo en la domo de Georgi Dimitrov partoprenis ankaŭ grupo da geknaboj el la infana kant- kaj dramkollektivo „Bodra Smjana“. Inter ili estis Margarita Lilova — nun fama operkantistino, Domna Ganeva — nun konata aktorino, Nuška Grigorova, filino de elstara revoluciulo-esperantisto, nun reĝisorino kaj reperto en la Bulgara Televido. . . Guste Nuška Grigorova estas la knabineto sur la foto. Tiam Nuška deklamis du versaĵojn — „Onklo Dimitrov“ de Asen Bosev kaj „Feliĉan Novan Jaron“ de Elisaveta Bagrjana. Libere kaj senĝene, kun klara kaj sonora voĉo, esprim-

plene kaj emocie vicigante la vortojn, „la eta ĉarmulino“ kortuŝis ĉiujn.

Jen kiel priskribas tiun ĉi momenton la aŭtoro de la foto Ganĉo Stojanov: „Kiam Nuška deklamis, Dimitrov tre emociiĝis, eĉ larmoj aperis en liaj okuloj. . . Kiam ŝi finis, li kaptis kaj kisis ŝin kaj dum certa tempo tenis ŝin en sia ĉirkaŭpreno. Poste, sin turnante al la poeto Asen Bosev, li diris: „Tiu ĉi infano devas esti aktorino“. En unu el tiuj ĉi momentoj mi fiksas ilin sur la foto. Mi havis la bonŝancon kapti neripeteblan kaj simolan momenton kaj konservi ĝin por la estonteco.“

Kaj jen kion rakontas Nuška Grigorova mem: „Tiu ĉi tago restis en mia memoro kiel tago ĝojplena. Kaj mi kredas ke ni ĉiuj, kiuj tiam estis en la gastama domo de Dimitrov, restis por ĉiam fidelaj al li. . .“

La foto havas sian propran vivon. Ĝi estas simbolo de la tempo, ĝi multon diras pri la vivosenco de la revoluciulo Dimitrov. La maljuna viro sur la foto estas ankaŭ la heroo el Lejpcigo, la homo, kiu dum sia tuta vivo batalis por la feliĉo de la orhara knabineto, por la feliĉo de ĉiuj estontaj geknaboj. Tial ĝi ne maljuniĝas, ĝi apartenas al la estonteco, al la eterneco. . .

Teksto: DONKA NENKOVA
Foto: GANĈO STOJANOV

FESTO DE L'INFANOJ

de LIANA DASKALOVA

Kiom da infanoj
estas vi? — Sen fin'!
Pro tio l' infanoj
gloras, festo, vin.
Tiam suno gajas,
brilas per kares',
vent' junia kantas,
pluvas ĝoje, jes!
Kaj la mond' trankvile
vivas per juni',
ĉar infanoj lerte
kaj kun harmoni',
gvidas marajn ŝipojn,
traĵojn kun kuraĝ',
kaj aviadilojn
en infana aĝ'.
La popol' infana
iras al la glor'!
Saĝa kaj kapabla
kun flama kor'!
Ili ĉiun taskon
plenumas kun ĝoj'!
En amo kaj paco
kresku via mond'!

Tradukis: L. BOJAĜIEVA



BULGARAJ LUKTISTOJ GAJNIS LA ORON DE LA EŬROPA ĈAMPIONECO

Dum naŭ tagoj de la Eŭropa Ĉampioneco — de 17 ĝis 25 de aprilo k. j. en la Palaco de Sporto kaj Kulturo en Varna renkontiĝis la plej elstaraj kaj la plej fortaj atletoj en la tri stiloj — klasika, libera kaj „sambo“.

En malfacila, ambicia konkurado la bulgaraj luktistoj montris mirindan emon pri venko kaj la ĝisnunaj mondaj kaj eŭropaj ĉampionoj estis vere surprizitaj de siaj junaj kolegoj, kiuj tute ĵuste gajnis la titolojn de novaj mondaj kaj eŭropaj venkintoj, gajnis la plej altajn sportistajn titolojn kaj medalojn.

Dek unu eŭropajn titolojn, 21 medalojn denovis al la bulgara sporto ĝiaj „oraj knaboj“, kies nomojn 169 ĵurnalistoj el diversaj landoj de la kontinento ne preterlasis noti en ĉiuj siaj informoj kaj raportoj pri la konkurado en Varna: Petar Balov, Andrej Dimitrev kaj Nikola Dinev — oraj medaloj kaj ĉampionaj titoloj en klasika stilo; Valentin Minev — ora medalo en kategorio ĝis 62 kg „sambo“; Efraim Kamberov — la titolo de eŭropa ĉampiono en lukto de libera stilo. . . Ni mencias nur la „pintojn“, sed multaj aliaj bulgaraj luktistoj sekvis ilian ekzemplon kaj montris altajn kvalitojn de sportistoj de plej granda klaso.

Estante la specialistoj pritaksas la akiritajn rezultojn kaj la sportistoj-ĝestoj kaj partoprenintoj en la ĉampioneco longe memorigas tiun konkuradon kaj plurfoje ili renkontas siajn bulgarajn kolegojn en noblaj luktoj.

Koran dankon, venkintoj!

Bogdan STEFANOV



DEZIRAS
KORESPONDI

BULGARIO

Mariana Elenova (24-jara oficistino) — 1303 Sofio, bul. „Aristo Botev“ 97 — kun ĉi pri literaturo, muziko, Esperantologio kaj amatora arto.

Milen Makedonski (16-jara lernanto) — 5800 Pleven, ul. „Goce Delčev“ 4, v. 2, ap. 10 — kun ĉi pri muziko, komponado, Interŝ. fotojn kun artistoj, rok-grupoj kaj floroj.

Rumen Dimitrov (34-jara fraŭlo) — 1504 Sofio, ul. „Dimitar Poljanov“ 1 — kun fraŭlinoj el ĉi pri geografio, angla lingvo, Eble intergastado.

Mariana Petrova (17-jara lernantino) — 3400 Mihajlovgrad, kv. „Košarnik“, ul. „M. Kunčev“ 41 — pri lingvoj, literaturo, muziko, psikologio.

Partoprenantoj en E-kurso el Pernik — kun ĉi: — Antoaneta Stefanova (14-jara) — v. Ljulin, Perniški okrag — pri literaturo, muziko, kino, Interŝ. BK, gramofondiskojn kaj E-revuojn;

— Valentina Joneva (14-jara) — v. Ljulin, Perniški okrag — pri literaturo, muziko, kino, Interŝ. BK, gramofondiskojn kaj E-revuojn;

VENEZUELA

Gestudentoj-esperantistoj kun ĉi:

— S-ro Alfredo C. Portillo — Ultramar Express, Av. Andrés Bello, Ed. Catleya, Esq. Av. Los Samanes, Caracas 1050 — pri tabloteniso kaj sportoj;

— S-ro Roberto J. Sánchez M. — Av. Intercomunal del Valle, Resid. Radio Valle N° 1, Piso 8, Apto. 8-6, Caracas 1090 — pri sportoj;

— F-ino Gloria Beltrán G. — Calle 13 — Resid. „Ana Teresa“, Piso 2, N° 21, Calle La Urbina — Caracas 1070 — pri nagado kaj promenado;

— S-ro Rubén Candia C. — Autopista Prados del Este, Calle Valle Alto, Resid. Isla Verde, Piso 7, Apto 7-B, Caracas 1080 — pri futbalo kaj kino;

— S-ro José Leonardo Chirinos — Av. Intercomunal del Valle, Resid. Don Pedro, Edif. „E“, Piso 15, Apto 15-4, Caracas 1090 — pri sportoj kaj PM;

— F-ino Indiko H. Gallo K. — Calle La Jaya, Edif. La Joya, Apto 16, Chacao, Caracas 1060 — pri muziko kaj promenado;

— S-ro Rafael E. García, Calle 9, N° 9, Propatria, Caracas 1030 — pri atletismo.

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI, prof. Vasil ĈOĈOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN, Flori NIKOLOV

Administranto — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodo“ — I grado. Eldonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Presejo „Georgi Dimitrov“ (II bazo)

P. K. 66
1000 Sofio

VIZITU LA BELAN URBON LOVEĈ!



Tie, kie finiĝas la Montetoriĉa Danuba Ebenajo kaj la klarakva rivero Osam, jam trankviliginte, forlasas la pentrindan intermonton en la lastaj faldoj de Balkanmontaro, situas urbo Loveĉ.

Loveĉ estas antikva loĝloko. En la rokaj kavernoj oni trovis restaĵojn de prahistoria homo. Poste tie ĉi estis Traca loĝloko. La mezepoka urbo estis konstruita sur la ruinoj de la romia fortikaĵo Melta.

Dum la ribelo de fratoj Asen kaj Petar kontraŭ la bizanca jugo (1185—1187) Loveĉ estis grava fortikaĵo, kiu defendis la alirejon al la ĉefurbo Veliko Tirnovo. En Loveĉ, post trimonata malsukcesa sieĝo, la bizanca imperiestro Isak Angel II subskribis packontrakton, per kiu estis rekonita la regotenco de Asen kaj Petar kaj estis metita la komenco de la Dua Bulgara Regno (1187).

La Fortikaĵo de Loveĉ rezistis ankau kontraŭ la turkaj invadoj en XIV jc.

En XV—XVIII jarcentoj la loĝloko evoluas kiel ekonomia kaj kultura centro.

En 1869 en Loveĉ Vasil Levski fonda revolucion komitaton, kiu estigas centro de la revolucia agado en Bulgario. La unua estraro de la Bulgara Revolucia Centra Komitato (BRCK) estas elektita la 1-an de januaro 1870. De la malnovaj libroj oni ekscias la nomojn de ĝiaj membroj: Marin pop Lukanov, Ivan Drasov, pop Krastju kaj Anastas Ccoov Hltrov.

Nun Loveĉ estas distrikta centro kun bone organizita ekonomio. Reganta branĉo estas la industrio — en la urbo funkcias fabriko por produktado de bicikloj kaj motorecikloj „Balkan“, fabriko por mikroelektromotoroj kaj instrumentoj, konserv- kaj ledfabrikoj ktp.

Loveĉ estas ankaŭ kultura centro de la distrikto — en ĝi estas multaj lernejoj —

politeknikaj, profesiaj, gimnazio por instruado de fremdaj lingvoj, historia muzeo, teatro. Sur la monteto Hisarlak troviĝas la nun restarigataj ruinoj de la romia kaj mezepoka fortikaĵo „Melta“, kaj en ĝia bazo situas la malnova urboparto Varoŝ, kie estas konservitaj karakterizaj por la bulgara mezepoka arkitektura stilo domoj kun elstarantaj balkonoj, largaj internaj kortoj kaj altaj kortbariloj. Tie ĉi estas la Domo-muzeo „Vasil Levski“.

La nova urboparto formiĝis post 1878, sur la alia bordo de rivero Osam. Ambaŭ partojn nun ligas la tegmentita ponto, konstruita en 1874 de la tiam fama majstro-konstruisto Koljo Fičov. La ponto estis el ligno, kun 64 butikoj ambaŭflanke. Ĝi estis la unua kaj ununura tegmentita ponto en Bulgario, kiu per sia beleco memorigis la faman Ponte Vecchio en Florenco. En 1924 la ponto forbrulis. Pli malfrue oni ĝin restarigis — jam el ferbetono.

Bela vojo kondukas de la Tegmentita Ponto, preter turista hotelo „Strateŝ“ al la Altaĵo de Libereco. Tiu ĉi antaŭe dezerta loko nun estas transformita en pitoreskan parkon. La malhelaj rubandoj de la asfaltvojoj zigzagigas inter dekoraciaj arbustoj kaj koketaj laŭboj, kunligas lagetojn kun kurbaj pontoj, kondukas al la zoologia ĝardeno, al la subĉiela teatro kaj al la vilaoj, dronantaj en verdaĵo kaj siringarbustoj. Ili donis la nomon de la Kulturaj Muzikaj Siringaj Festoj, kiuj okazas en majo en la urbo. De la teraso de hotelo „Strateŝ“ malkovriĝas la plej bela vidaĵo al la urbo.

Dum la Rusa-Turka Liberiga Milito 1877—78 tie ĉi, sub la komando de generalo M. D. Skobelev, okazis la bataloj por liberigo de Loveĉ — pereis 1500 rusaj soldatoj. Du monumentoj en la parko memorigas pri ilia sinifero.

En la centro de vilaĝo Kakrina, situanta sur la ŝoseo al Sevlievo, en la korto de la historia gastejo, kie estis arestita la apostolo de la bulgara revolucio Vasil Levski, estas marmora plato kun surskribo: „La 28-an de decembro 1872 frumatene turkaj policanoj vundis kaj kaptis nian apostolon Levski. Tiu ĉi loko estas surversita de lia sango“.

Kaj apud vilaĝo Slivek, sur la vojo al urbo Trojan, apud la ruinoj de la historia monaĥejo „Jastrebo“, blankas monumento — sur tiu loko ĉesis bati, trafite de kuglo, la koro de la flama poeto-partizano, la esperantisto Hristo Karpaĉev.

Certe ankau multajn aliajn sekretojn kaŝas la malnova urbo Loveĉ kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Sed eĉ tio, kion oni scias, sufiĉas por amii tiun ĉi belan regionon de nia patrolando.

L. ANTONOVA